

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 616 (3)

Marto 1957



**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

5-jara Jubileo de CED



*Ĉi tie parolas Prof. D-ro Lapenna,
honorofica Direktoro de la Centro de
Esploro kaj Dokumentado. En januaro
1957 CED festis sian kvinjaran datre-
venon. (Vidu p. 33).*



ESPERANTO

Marto 1957

Revuo Internacia

N-ro 616 (3)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Cion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

* * *

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaron al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.)

Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkuponon por ĉiu duon da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

P. M. Mabesoone, vic-prezidanto, estrarano pri financoj, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

Grava 5-jara datreveno	33
Kelkaj pensoj pri la Internacia Lingvo	34
Plantado. <i>S. J. Shori</i>	36
Alvoko al la instruistoj	38
La Universala Ekspozicio	39
Cézanne: pentristo malbenita. <i>H. Perruchot</i>	41
4 poemoj pri katido. <i>M. Boulton</i>	45
Nia progreso	47
Lingvo kaj kulturo	48

Rubrikoj	
Niaj konkursoj	35
Esperantista vivo kaj Nekrologo	38
CED	39
La Juna Vivo	40
Tra la mondo	43
42a U.K.	44
Novaj libroj	49
La internaciaj konkursoj	51
Oficiala Informilo	51



GRAVA KVINJARA DATREVENO

Esperanto celas kunigi homojn kaj ebligi al ili rekte interrilati. Inverse, grandaj potencoj en la mondo celas disigi homojn en grupojn kaj regi la eblecon de interrilato inter la grupoj. Pro tio la Esperanto-movado ne povas esperi daŭran kaj konvinkitan kunlaboron de la potencoj, kiel, ekzemple, ĝi ricevis de la Esperanto-fako de la Ministro de informado en Ĉeĥoslovakujo frue post la mondmilito. Ni do devas krei niajn proprajn rimedojn se ni deziras internacie profiti el la grandega laboro farita de esperantistoj, kies frukto tro ofte perdiĝis estinte. Sed, kiel ĉiu Ŝtata financisto konfirmus, la planado kaj direktado de laboro je internacia skalo estas malfacila kaj multekosta. Nur la fakto ke Prof. D-ro Lapenna kiel direktoro kaj la kunlaborantoj tra la mondo estas volontuloj nepagitaj ebligis al la movado, je la iniciato de Prof. D-ro Lapenna, fondi la Centron de Esploro kaj Dokumentado (CED) kiu post kelkmonata intensa preparado estas plene funkcianta de la 1-a de Januaro 1952. Nun CED estas bone konata inter ŝtataj kaj privataj internaciaj organizaĵoj kiel fidinda fonto de informo pri la internacia lingvo Esperanto kaj rilataj temoj.

La celoj de CED estas:

(a) Sciencaj esploroj: teoriaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj pri ĝiaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiviteco; studado de la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de Esperanto; esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo.

(b) Dokumentado: Kolektado de ĉiuj studoj kaj artikoloj pri la punktoj menciitaj sub (a) havigo, ordigo kaj enregistriĝo de ĉiuj pli gravaj dokumentoj koncerne la problemon de Internacia lingvo kaj la Esperanto-Movado; enketoj kaj sta-



Okaze de la 5-jara jubileo de CED, en ĝia oficejo estis aranĝita malgranda festo. Sur la foto la Direktoro, Prof. I. Lapenna (sidanta), klarigas al s-ro N. Smith, Komitatano de UEA (apud li), kaj al s-ro H. W. Holmes, Vicprezidanto de UEA (dekstre), la funkciadon de CED.

tistikoj pri diversaj aspektoj de la Esperanto-movado; bibliografia servo.

(c) Informado: Eldonado de dokumentoj en la angla, franca kaj laŭ ebleco en aliaj lingvoj, verkitaj surbaze de la materialoj menciitaj sub (a) kaj (b) kaj dissendado de tiuj dokumentoj al la plej gravaj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj; ellaboro de dokumentaroj por specialaj celoj kaj en specialaj okazoj; aktiva partopreno en ĉiuj internaciaj kongresoj kaj konferencoj kie estas pritraktata la lingva demando en internaciaj rilatoj.

Ĉiujare la Direktoro faras laborplanon anticipe, distribuas la taskojn al la kunlaborantoj kaj prizorgas la plenumon de la plano. Nunmomente estas 82 kunlaborantoj en 20 landoj. La sekretario, la sola pagata oficisto de CED, faras la tutan teknikan laboron de korespondado, registrado kaj distribuo.

Dum la unuaj kvar jaroj la „oficejo” de CED estis en mansarda ĉambreto kaj mi opiniis ke estus neeble en tia loko produkti la imponajn dokumentojn verkitajn de la Direktoro, kaj registri kaj teni la paperaĵojn tiel ke post nur sekundoj iu el la amasego povus esti en la mano de petinto. Aldone al la vasta korespondado jam estas registritaj 852 dokumentoj. La koncentriĝo de laboro estis tia ke mi timis pri la sano de la Direktoro kaj sekretario. Sed la rikolto estas granda ĉar ilia inspiro radiis tra la movado kaj instigis al plia planita laboro pro kio ni nun havas pli da scio kaj faktoj je nia dispono, sen kiuj ni ne povas efike labori en sciencaj oficialaj rondoj.

Kiel indikon mi povas citi nur kelkajn el la taskoj faritaj de CED.

CED faris en 1952 grandan esploron pri la nombro de esperantistoj. Ĉirkaŭ 100 personoj kaj organizaĵoj kunlaboris en tiu afero. Pli ol 700 cirkuleroj kaj korespondaĵoj estis senditaj. Rezulto de plurjara laboro de S-ro W. Auld estis la Bibliografio de la Internacia Lingvo por la jaroj 1945 ĝis 1956. Tiu laboro estas daŭrigata. Okaze de la UNESKO Konferenco en Parizo, CED organizis grandan debatvesperon por la diversnaciaj reprezentantoj. S-ino Sly faris enketon pri la manieroj, laŭ kiuj oni lernas Esperanton. Prof. Waringhien esploris la vortprovizon en komuna uzo. S-ro Largentier faris raportojn kun statistikaj tabeloj pri ĉiuj Esperanto-elsendoj inter 1945 kaj 1956. CED liveris al UNESKO plene ordigitajn materialojn pri la Esperantlingvaj tradukitaj verkoj por „Index Translationum”. S-ro D. Kennedy faris enketon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj kaj pri la nombro de instruistoj-esperantistoj. S-ro G. C. Fighiera kolektis informojn pri ĉiuj placoj aŭ stratoj, kiuj portas la nomon „Esperanto” aŭ „Zamenhof”.

D-ro W. P. Roelofs enketis pri la sciencaj kaj teknikaj periodaĵoj, kiuj publikigas Esperantlingvajn artikolojn. Alia enketo (gvidanto S-ro D. Kennedy) estis farita pri la efikoj de la lernado de Esperanto al edukado. En kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo CED kolektis kaj ordigis la materialojn por la Universala Ekspozicio, kies unua elmonro estis en Montevideo, la dua en Strasbourg kaj la tria en Kopenhago. La direktoro kaj pluraj kunlaborantoj de CED (Prof. Collinson, Doc. S. Pragano, D-ro Roelofs, D-ro G. F. Makkink, S-ino J. Isbrucker, S-ro A. Ĉe kaj aliaj) aktive partoprenis en la kongreso de Arnhem pri la lingva diverseco kiel Eŭropa problemo.

Surbaze de tiaj enketoj, statistikoj, studoj kaj dokumenta materialo, CED ellaboras kaj jam eldonis 75 dokumentojn. Speciale gravaj estas CED/3 eldonita por la Pariza Uneska Konferenco en la angla franca hispana itala nederlanda kaj finna lingvoj kaj CED/4 por la Konferenco en

Montevideo en la angla franca kaj hispana lingvoj. CED sendis artikolojn al la informaj fakoj de la landaj asocioj, kiuj aperis en centoj da revuoj kaj gazetoj en tridek lingvoj. Klopodu taksu la grandan traduklaboron faritan de kunlaborantoj.

La grava CED dokumento aĉetebla de ni ĉiuj estas la verko „La Internacia Lingvo-Faktoj pri Esperanto”.

Feliĉe nun la oficejo de CED en 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Anglujo, estas pli bone lokita, kaj la aĉeto de diktmaŝino el la kaso por oficeja ilaro kaj ŝtalaj ŝrankoj el la testamentaro de S-ro V. V. Sumfield pli faciligas la laboron.

Je la kvina fondiĝdatreveno, ni gratulu al la Direktoro, Sekretariino kaj ĉiuj kunlaborantoj pro sukcesplena laboro kaj samtempe memoru ke mono, donacita al CED, rapide kaj rekte helpas al la progreso de Esperanto en la plej gravaj rondoj.

H. W. HOLMES

Kelkaj pensoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝia literaturo

Interjuro kun Akademiano Ivo Rotkviĉ okaze de la Esperanto-dissendo de Radio-Zagreb, la 20-an de novembro, 1956

— *Kion vi opinias pri la evoluo de Esperanto post la lasta mondmilito?*

— Provante respondi vian demandon mi devas rifuĝi al la komparo, kiu eble plireliefigos la problemon. Se ni metus sur la pesilteterojn du periodojn, tiun post la unua mondmilito kaj ĉi tiun post la dua, sendube la unua estus multe pli fruktopeza ol la dua, almenaŭ ol la dua ĝis nun. Tiu periodo, kiam sub la pitoreska sunombrelo, la „Literatura Mondo”, ariĝis ĉirkaŭ Baghy kaj Kalocsay potencaj forĝistoj de nia lingvo, restos, mi kredas, por longa tempo nesuperebla.

— *Do, laŭ vi, la nivelo de la nuna lingvo-evoluo glitis malsupren aŭ iel ekstagnis?*

— Ho ne, mi ne povus insisti pri tio. Dinamiko de nia lingvo ankaŭ nun pulsas barorompe, verkistoj ankoraŭ ĉiam turnas frazojn en fosforeskajn spiralojn kaj poetoj elkisas sorĉajn tonojn el sia fluto, sed la riĉaĵoj de la lingvo amasiĝas nur sur la surfaco, oni dislarĝigas periferion de la lingvo, konkerante novajn radikojn. Sed, bedaŭrinde, oni iel malzorgas la internan potencon kaj la esprimeblon, kiuj kaŝiĝas en la balgaj krispoj de Esperanto kaj kies eliminado dispartus novajn, matenfresajn perspektivojn.

— *Kio estas kaŭzo de tiu interesa fenomeno?*

— Kaŭzoj estas multaj, sed mi ne disponas la tempon por elĉerpe paroli pri ili. Mi nur traglite tuŝos kelkajn. Antaŭ

ĉio estas du sociologiaj faktoroj: la interŝanĝo de la generacioj kaj la radikala renversiĝo de la kriterioj pri valoroj en la medio tra la tuta mondo.

— *Kial influas la interŝanĝo de la generacioj?*

— En la spirito de la generacio post la unua mondmilito ankoraŭ fidele brulis pionira entuziasmo, idealista sinoferemo kaj speciale forta emocio rilate al la lingvo, kies tiutempan evoluo eble oni povus resumi en la frapan paradokson: *la plej granda riĉo de Esperanto estas ĝia malriĉo!* Guste tiu emocia rilato al la lingvo estis mirinde fekunda grundo, el kies atomoj la lingva trunko suĉis eliksiron por transdolĉigi ĝin en fruktojn de neordinara beleco. La lingvo evoluadis ĉefparte elmeme, florpolvero alventita el aliaj lingvoj estis nur la necesa „kruc-polenado” por malhelpi degeneron de kelkaj precipe sentemaj specoj.

— *Kaj la nuna generacio, kia estas ĝia rilato al la lingvo?*

— Kiel okazas ĉiam, la nova generacio venis kun novaj konceptoj kaj idealoj. Estis necesa ioma tempo por ĝia instaligo sur la rangseĝoj de la movado kaj tial oni ne povas jam nun tute klare determini la evoluon diagramon. Sed unu fakto estas senduba; ĉi tiu generacio ricevis en la manojn jam elpoluritan, perfektan instrumenton, kies elrafiniĝo ne iris tra ĝia emocia vivo. Tial ĝi plejparte traktas la lingvon nur kiel artistan esprimilon kaj — ĉar la nova generacio estas literature matura — ĝi

emas evoluigi la lingvon laŭ la maniero, kiun ĝi trovas en la naciaj literaturo kaj lingvo. La brila spegulo de Esperanto pli kaj pli vastiĝas, sed la uraganaj krizoj de la animo ne ŝaŭmkirlas la ondojn el la lingva profundo, oni nur rabe kunrompas pecetojn el la bordo.

— *Se mi bone rememoras, vi menciis, ke ankaŭ la radikala ŝanĝigo de la medio grave influis la lingvan evoluon?*

— Jes, tiel! La pulso de vivdinamiko inter la du militoj estis multe malpli rapida, eldirita aŭ skribita vorto kutime havis pli pezan enhavon, bildo ne konkurencis vorton tiomgrade ktp. Nun ĉion kaj ĉiun infektiŝ febra urĝo, homo ĝibkurbiĝas sub la pezo de vortinundo, kurbildo sur la ekrano iĝis preskaŭ ĉefa edukilo kaj distrajo, lingvo en la ordinara uzo reduktiĝas al la telegrafa slango kaj simile. Komprenoble, lingvo kiel resp. pegulaĵo unuflanke de la mensa kaj emocia vivo de individuo, aliaflanke de la konkreta medio ĉirkaŭ la individuo, sizmografe reflektas ĉiujn ŝanĝojn, adaptiĝante al la bezonoj de ĉiutago. Kaj Esperanto kiel la vivanta lingvo de la vivanta popolo ne povas hermete sin forfermi antaŭ tiuj fenomenoj.

— *Do, Esperanto kiel la vivanta lingvo de la vivanta popolo estas sub la rego de samaj faktoroj kiel la naciaj lingvoj?*

— Sendube. Sed la influo de opaj faktoroj, kiuj reguligas la evoluon de naciaj lingvoj, ne estas plene kaj rigore identa en Esperanto. Dum en la naciaj lingvoj estas granda diferenco inter la parolata kaj literatura lingvoj, en Esperanto tiu diferenco preskaŭ ne ekzistas. *Tial Esperanto estas verdire, la plej senerare parolata kulturlingvo en la mondo.* Ĝia literaturo estas la sola fonto kaj reguligilo de la lingva trezoro, tial ĝi havas tiel eksterordinaran gravecon, eĉ kiam ĝia arta nivelo ne estas laŭtempa.

— Nu bone, se la literaturo havas tiel nesupertakseblan valoron por la lingva evoluo de Esperanto, en kia stato ĝi troviĝas nun?

— Mi jam aludis, ke la nuntempaj esperantaj verkistoj montras ĝojige maturajn kvalitojn. Sufiĉas mencii nur la du laste aperintajn librojn, tiujn de Marjorie Boulton kaj Gaston Waringhien. Neniu nacia literaturo hezitus ornamii per ili sian inventaron.

— Vi diris, ke en la periodo inter la du militoj la „Literatura Mondo” kroĉis al siaj paĝoj la plej brilajn plumojn el niaj verkistoj. Kio estas la fokuso en la nuna tempo?

— Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne havas tiel fortan centron, kia estis la „Literatura Mondo”. Tamen ni povas rigardi kun fido en la posttempoj, ĉar tri nunaj fajrujoj vekas tre grandajn esperojn. La unua estas „STAFETO”, eldonejo sub la saĝa kaj enviinde persista gvido de Régulo Perez, la dua „NICA REVUO”, kiun prilumas la magia lanterno de Waringhien kaj laste, sed ne lasta „NOR-DA PRISMO”, kie disbrilis la redakta plumo de Szilagy. Tiuj celdisaj centroj ne devas esti manko. Eĉ! Aŭ almenaŭ ni esperu!

— Nun pli konkreta demando. Min zorgigas multaj neologismoj, kiuj displuvis en la lingvon lastatempe. Ĉu vi trovas ilin pravigindaj?

— Hej, tiu problemoj pri la neologismoj estas kverelsemo en nia movado preskaŭ de ĝia naskiĝo. Nekontesteble, ĝi estas prapeko de niaj verkistoj. Ĉu vi rememoras: „Esperantisto sonĝas pri rimoj, ve, de la sonĝo venas krimoj!” Tamen tio estas tute natura, ĉar la esperantista rondo estas socia grupiĝo, kiel ĉiu alia. Kun samaj virttoj, kun samaj pekoj. En ĉiu socia grupiĝo estas du ĉefaj partoj: la konservema kaj la novema. Al la konservema inter la esperantistoj ĉefe apartenas propagandistoj, al la novema verkistoj. Facile kompreni, ke la celoj, kiuj inspiras unujn kaj la aliajn, esence kaŭzis la dispartigon. Sed ne nur tio. Kiel dirite, la lingvon regas la leĝoj de vivo, multaj vortoj kaj parolturnoj, kiuj antaŭe aplombis, devas nun kolapsi sub la ĉerkan tolon, dume aliaj novaj erupcias en iliajn postenojn. Tiu ĉi ĉiam lingvan rejniĝon povas bari nenio. Klisiĝinta lingvo estus simila al marĉo, kiun parfumas koto kaj putraĵoj. La vivanta lingvo de la lipspitaj verkistoj ne toleras gardan monotonon, ĝi estas bolŝaŭma rivero, kies impeta torento disperleras tra akvofaloj. Verkisto bezonas la lingvon ne sole sence preciza, sed ankaŭ plastika, hipnotiga kaj tridimensia, li celas efiki premotuŝe sur la kaŝitajn risortojn de subkonscio, tra kiu disaraneaj siajn delikatajn radikojn niaj emocioj. Verkisto penas por la aparta parolmagio. Li ĉasas dancan kadencan, stebsiran koncion kaj postvibrajn rimojn.

— Laŭ tio ĉu mi konkludu, ke vi larĝbrake akceptas la neologisman inundon.

kiu superondis postmilito nian literaturon?

— Tute ne. Mi, laŭ la temperamento, estas mezvoja homo kaj evitemas la ekstremojn. Sed mi ne povas pretervidi la faktojn de vivo. Neologismema tendenco, kiam aplikata sobre kaj probezone, enblovas oksigenon en la lingvan organison. Estas multe da vero en la sia-tempaj sagpintaj asertoj de Kalocsay, ke la literatura vortaro devas estis pli ampleksa ol tiu por la ordinaraĵ konversacioj. Tamen malfacilaĵo alvenas, kiam oni provas dislimigi la literaturon de la ordinara interparolo. Ĉar la literaturo ne estas nur sur la paĝoj de libroj, ĝi ankaŭ animas konversaciojn, interflustrojn, rerakonton de travivaĵoj ktp. Sed tamen oni devas atentigi pri la superstiĉo, kiu tiranas tre multajn esperantajn verkistojn. *Kunamasigo de multaj vortoj en neniu lingvo estas per si mem riĉo.* Riĉo ja ne estas en la plimultigo de fortepianaj klavoj, sed en ilia interkombino. Kelkfoje iel perverse oni engluas tiom da neologismoj en frazojn aŭ versojn, ke ĉe la leginto postrestis nur pirozo kaj barelkavaj sonoj de silaboj. Sendube oni povus elsorĉi multe pli sukajn, emociajn esprimojn el la jam ekzistanta lingvaĵo. Krome, kelkaj unuarangaj verkistoj, devene apartenantaj al la angla lingvo, estas nekonscie tiel sub la influo de speciala karaktero de sia lingvo, ke ili blindkapte enrudas superflujajn sinonimojn, kiuj dishirtigas eĉ ilian nacian idiomon. *Esperanto estas nek filio de iu lingvo, nek kopio de ĝia esprimmaniero aŭ lingvaj tendencoj.* Mankas al mi la tempo por elmontri psikologiajn leĝojn, kiujn rompas tiu avido por ĉiam novaj radikoj. Tial mi diru nur resume: *ne vorto, sed frazo estas lingva unuo, la senco kaj koloro de la vorto dependas de la tuta frazo kaj afekciaj elementoj, kiuj kasiĝas sub la frazeraj, formantaj nediserigeblan tuton.*

— Nu, ĉe la fino mi volus turni al vi la demandon pri la Akademio de Esperanto. Ĉu vi opinias ĝian funkcion sufiĉa aŭ vi kredas, kiel multaj aliaj, ke ĝi iel tro inertas?

— Pri tiu temo mi ne estas kompetenta aŭtoritate paroli, ĉar tiu rajto apartenas al la prezidanto de la Akademio. Tial miaj respondoj estas nur privataj, senpretendaj. Do, mia opinio pri la temo estas, ke la plenumo de la laŭdevaj taskoj, kiel tion praktikas la Akademio, estas celtrafa kaj tre prudenta. Laŭ la heredita tradicio la Akademio devas gardostari por la normala evoluo de Esperanto, ŝirmi kaj dreni la kuŝujon de la rivero elfontinta el la esperantista praroko — la FUNDAMENTO. Aŭ koncize: *observi kaj ĵaluze kontroli la unuforman kontinuecon de Esperanto.*

— Sed kio kreis tiun opinion pri laspeca dormado de la Akademio? Ĉu vi, kiuj estas membroj de tiu institucio konscias, ke oni ofte ne estas kontenta pri via postkuro al la prilingvaj postuloj?

— Por vin seniluziigi mi respondas jes. Ni estas konsciaj pri! Versajne la opinio de multaj esperantistoj, ke la akademianoj nenion faras, sed kalkanside rostas pirojn, estas kaŭzita pro la tro oblikva perspektivo en la lingvajn problemojn. La lingvo ne subjuĝiĝas al arbitraciaj verdiktoj de la lingvistaj fakuloj, ĝi havas siajn proprajn, el-enajn leĝojn de funkciado. Jen porilustre nur du ekzemploj. Preskaŭ ĉiuj okcidentaj lingvistoj kredis en la braksida aĝo de nia lingvo, ke estas du bazaj eraroj, kiujn Zamenhof uzis kiel spinon por Esperanto: la supersignitaj literoj kaj la akuzativo. Tial multaj estis konvinkitaj, ke tiuj du mankoj sufiĉos por renversi Esperanton en la abismon de forgeso. Nu, en vivo montris, ke inter la ĉielo kaj la tero estas pli multaj aferoj ol kredigas sciencaj volumoj. La supersignitaj literoj montriĝis perfekta solvo kaj la akuzativo iĝis ĉefa ĉarniro de la lingvo, donante al Esperanto elastecon, kiun povas prienvii eĉ la grandaj kulturlingvoj de la Okcidento. *Sekve, ĉiu apriora alpaŝo al la lingvaj problemoj estus fatala eraro.* Oni rajtas aliri tiujn problemojn nur aposteriore. Aŭ kiel vi preferis diri „postkure”.

— Sed ĉu tia sintenado de la Akademio ne endanĝerigas la kontinuecon de la lingvo, kiu povus ekdisŝali en dialektojn?

— Neniuokaze! Ĝuste antaŭ kelkaj monatoj oni povis sperti preskaŭ fulman reagon de la Akademio kontraŭ la vortaro de Azorin. Bonega pruvo, ke la Akademio plej konscie plenumas siajn devojn. Cetere, la membroj de la Akademio multe laboras pristudante ĉiujn facetojn de la problemoj, kiujn la vivo de Esperanto metas sur ilian rabotstabilon. Kaj al tiuj esperantistoj, kiuj koleras kontraŭ la Akademio, ĉar ili ne trovas solvojn de ĉiuj problemoj en la ŝvelventraj gramatiko kaj vortaro de la Akademio, mi povas doni ununuran konsilon: *la lingvon oni ne lernas sole el la gramatikoj kaj vortaroj, sed unuavice el la bonaj verkoj.* Kaj en Esperanto estas tiom da bonaj verkoj, ke ili povas abunde oferi ĉion necesan por niaj lingvaj bezonoj, kompreneble ĉion, nur ne — la genion. Tion devas posedi ni mem. Vere, la lingvo estas perfekta, sed bedaŭrinde, ni esperantistoj — tre malperfektaj.

Niaj Konkursoj

Literatura Vefludo N-ro 3

Verku jurnalraporton pri iu evento fantazia, aŭ reala (aktuala aŭ eĉ historia). La raporto devas enkonduki titolojn de Esperantaj libroj kiel normalajn vortojn en la frazoj. Maksimume 250 vortoj. La plej spritaj ricevos libropremion kun enskribo. Konkursajoj atingu la redakcion ĝis la 30a de aprilo.

Pseŭdonimo laŭvole (sed aldonu la ĝustan nomon kaj la adreson).

John Varty

Plantado



Veturante fervoje al Jerusalemo, ni trapasas la Judean montaron. Estas mirinda spektaklo: ni rimarkas, ke la montoj preter la fervoja relaro tra longaj distancoj konsistas el multegaj nealtaj tertavoloj, kiuj etendiĝas de malsupro de la montoj ĝis iliaj pintoj. — Tamen, se ni observas pli atente, ni trovas, ke prezentiĝas antaŭ ni verkoj de homaj manoj. Oni volis, ke ekverdu denove la regiono, dezerta dum dumil jaroj, kaj oni konstruis sennombrajn terasojn, kie ekhaltu la arbaj radikoj. Laboro neimageble giganta en sia amplekso, sed samtempe formika en la detaloj.

Pri arboplantado sur tiuj montoj parolas tiu ĉi rakonto.

La tradukinto.

Lunde antaŭ la vespero alvenis junulo per ŝarĝaŭtomobilo kaj postulis, ke oni min voku. Mi venas kaj li alparolas min: — Mi estas de la arbokulturejo, mi alportis al vi arbetojn.

Mi respondas: — Mi atendis vin milionon da jaroj.

Li demetas sur la vojrandon kvar lignajn kestojn. Alvenas jemenidoj kaj kolektiĝas por vidi, kio nova estas en la kestoj.

Unu el la kestoj mi malfermas. Inter multa rabotaĵo kuŝas tie, unu proksime al alia kaj unu super la alia, etaj verdaj pistakuloj, ĝis nun malsekaj. Al ilia radikaro fiksiĝas ankoraŭ terbuloj kaj ili eligas el si agrablan odoron de bestoj. Mi diras al la jemenidoj, kiuj laboras kun mi:

— Morgaŭ ni plantos.

La postan tagon mi prizorgis mulon, Josif kaj Ĥajim surmetis sur ĝin kun granda peno du kestojn. En longaj vicoj alvenis la jemenidoj kaj grimpis sur vojeto, kiun ili pavimis kaj kiu serpentumis ĝis supro de la montoj. Malantaŭ ili paŝis la mulo. Ĥajim inspektas ĝin, ke ne falu de ĝi la kestoj, Josif ĝin tenas sur ŝnuro kaj kondukas ĝin supren laŭ la altiĝanta irejo. Ni alvenis al kerobo kaj haltiĝis. La du demetis la kestojn kaj starigis ilin apud la arbon.

La laboristoj staris ĉirkaŭ mi kaj atende rigardis, mi malfermis keston kaj elprenis arbeton. Mi

purigis ĝin de la rabotaĵo kaj de la tero, levis ĝin, por ke ĝin ĉiuj vidu, kaj mi diris:

..... Jen ido de arbo, kies nomo estas Roka Pistakulo. Ĝi estas nun malgranda. Ni ĝin plantos kaj se ni ĝin plantos bone, ni havos ĉi tie en iu tago grandan arbaron, kia estas tie — kaj mi per mano montris al suproj de la altaj arboj, kiuj estis videblaj sur la altaĵoj de Nir-el-ha'ava.

Per pioĉo mi moligis la teron, faris en ĝi truon, kliniĝis al la tero kaj enmetis la arbeton en la malgrandan truon, kunpreminte bone la teron de du flankoj, faris kaveton ĉirkaŭ la arbo kaj mi daŭrigis: — Jen ĝil!

Ili rigardis.

Mi dividis la laborantojn: Duono de ili preparos truojn, moligante la teron, la alia duono plantos. Amikon Josif mi starigis al la kesto kun arbetoj, ke li transdonu al ĉiuj plantanto en lian korbon certan kvanton da arbetoj kaj ke li kalkulu ĉiujn plantitajn arbetojn.

Ili ordiĝis en du vicojn: la pioĉantoj en vicon antaŭan kaj post ili la plantantoj kun siaj korboj. Ili ne estis spertaj pri tiu laboro, tial komence nur malrapide ili preparis la truojn kaj plantis la unuajn arbetojn. Ili iris antaŭen kaj supren sur la monton kaj lasis post si verdajn arbetojn en mezo de iliaj kavoj. La arbetoj iom sin movis en la vento kaj ŝanĝis la aspekton de la pejzaĝo. Ili estis

tre malgrandaj, sed en ilia eksterajo estis jam io de granda arbo, la trunko, la branĉaro kaj la malgranda ombro, kiun ili tamen jam donis.


Kaj ŝajnis al mi, ke antaŭ miaj okuloj aperas diversaj neklaraj bildoj: Mi vidis arbojn, kies branĉoj reciproke interplektiĝas kaj kiuj donas ie lumon, ie ombron sur tapiŝojn de pinglofoliaro. Mi vidis kvazaŭ arĝentajn fadenojn inter la verdaĵo. La granda Dio sternis sin super la regiono. Mi vidis arbarojn, kuŝantajn en longa vico kiel kamelaj ĝiboj, de deklivoj irantaj al valoj kaj de deklivoj al akvofontoj.

Mi vidis jemenidojn, kurdojn irakanojn, paŝantajn sur vojetoj inter arboj. Iliaj spinoj estis rektaj kaj en iliaj okuloj nova rigardo. Ĉio estis ilia. De la arbaroj ĝis la malproksimaj montoj. Kaj sur la montoj kaj en la sekaj riverkuŝejoj jen fruktarboj, grenkampoj, akvotuboj kaj domoj. Mi vidis antaŭ mi jemenidinojn, mastrumantajn en siaj hejmoj, vive bruantajn kaj interkriantajn kun siaj najbarinoj. Mi vidis infanojn, kiuj konis bone la irejojn tra la arbaro, ĉar estis ilia hejmo, ĉar rando de la arbaro estis por ili fino de la mondo, post kiu sekvis lando al ili ne konata. Ili sciis legi la postsignojn de la cervinoj, irantaj al akvoputoj, ili sciis distingi bruon de ĉiu viva estaĵo en la arbaro. Mi vidis virojn, revenantajn de laboro, observantajn la arbaron kaj malaperantajn malproksime ĉe ekstremo de la montoj — tie estis limo de ilia vivo, tie estis iliaj domoj kaj ilia pano...

La laborantoj progresis supren laŭ la montaj irejoj, rapide kliniĝante, ili enigis la junajn arbojn en la preparitajn lokojn kaj premis sur ĝin de ĉiuj flankoj la teron. La plantitaj arbetoj multiĝadis.

Mi vokis la virojn, ke ili interrompu la laboron kaj ripozu. La laboristoj sidiĝis apud siaj korboj. Ili estis tre lacaj kaj silentis.

Mi meditis: Ĝis hodiaŭ ne falis ankoraŭ pluvo en sufiĉa kvanto. Multaj el la plantitaj arboj mortos



Judea montaro antaŭ Jerusalemo.

kaj al la ceteraj oni devos dediĉi grandan klopodon, pioĉi kaj pioĉi kaj en la sekvanta jaro denove pioĉi kaj daŭrigi la plantadon. Kaj kiu scias, kio okazos. Eble regos granda sekeco, eble la jemenidoj forlasos tiun ĉi lokon kaj neniu zorgos pri la arbaro. Denove elkreskos ĉie miloj da dornaĵoj kaj sufokos la arbetojn.

Mi malĝojiĝis. Falis sur min laceco kaj melankolio pri sorto de tiu ĉi laboro. Mi pensis pri amasoj da homoj, kiuj ekloĝos sur tiu tero — kaj eble ĝin forlasos. Mi vidis, kiel ili veturas en ŝarĝaŭtomobiloj tra vojoj de la lando, unuopuloj kaj en grupoj, kun siaj infanoj kaj sia havaĵo, kaj ili fuĝas de tiu roka kaj malfacila tero, malproksima de loĝataj lokoj kaj ili serĉas avide teron novan, proksiman de urbo. Novan teron, kie estas akvo kaj en kies ĉirkaŭaĵo estas facile trovebla laboro, kie estas gajnebla mono, kie ne ekzistas timo antaŭ araboj kaj kie ne estas necesaj la lacigaj noktaj gardadoj.

... Poste mi ĉesigis la mediton kaj vidis ĉirkaŭ mi homojn, rigardis la landon kaj la montojn,

sunon de Granda Kredo, kiu volvis ĉion en riĉan brilon kaj en ĉion-ampleksantan amon. Kaj tiam mi ripetis al mi: Pro ĉio kaj malgraŭ ĉio — sur tiu ĉi tero loĝos multaj homoj, iu pro amo, iu pro neceso, alia pro tio, ĉar estas al li egale, kie li vivas. Estos tie ĉi vivo kaj kreado kaj arbaroj disvastiĝos sur tiu ĉi granda vojo, kondukanta al Jerusalemo...

La laborantoj ripozis. Fluis de ili ŝvito. Iuj restis starantaj kaj apogis sin ĉe roko aŭ metis sub siajn mentonojn bastonon de la pioĉo, iuj kuŝiĝis sur la teron kun disetenditaj brakoj. Kiel ŝajnis, ili ne parolis nek pensis pri la arboj kaj pri la arbaro.

Mi rememoris ilian vojon: Forlasinte siajn hejmojn ĉe rando de Arabio, ili alvenis en ampleksaj karavanoj, tra sablo de la granda dezerto. Ili iris, lacaj kaj prirabitaj. Kaj kiam ili atingis la urbon de la haveno, ili estis lokigitaj en tendaron, premitaj en grizajn tendojn. Ili timis ĉion kaj ne sciis demandi. Fine ili alvenis al grandaj aeroplanoj, kiuj ilin portis super la lazura Ruĝa maro. Kaj ili timis tre, sed ili legis la Psalmojn

kaj unu la alian fortigis. Ili pasigis en la aero la Edomajn montojn, la dezerton, Ejlat kaj duoninsulon Sinaj. Kaj ili estis metitaj en tiun ĉi landon. Ili atendis la Mesion — kaj Mesio estis nenie. Oni ilin denove kondukis en vicojn de grizaj tendoj. Ili iris tra la tendaro tien kaj reen kaj ĉiam denove miris. Poste ili laboris en mastrumoj de terkulturistoj, loĝantaj proksime de ilia tendaro. Iam estas la kamparano bona kaj li diras al ili vortojn nekompreneblajn, sed bonajn. Iam estas la kamparano malbona, li ilin trompas kaj priŝtelas pri mono, kiun ili devus ricevi de li. Ili enskribis sin en politikan partion, pensante, ke per ĝia helpo ili povos daŭre ekloĝi ie. Ili supozis, ke ili estos terkulturistoj similaj al tiuj, ĉe kiuj ili laboris aŭ kiel tiuj, kiuj estis en Jemen iliaj najbaroj, kiuj havis sian terpecon, kiuj prilaboris ĝin kaj ĝi donis al ili vivtenon. Tio estis en Jemen malpermesita al hebreoj. Unu tagon oni diris al ili, ke ili surŝarĝu siajn litojn kaj sian posedaĵon sur grandajn ŝarĝaŭtomobilojn, oni enprenis ilin kaj ĉion, kio al ili apartenis, kaj tiel ili alvenis tien ĉi. Laborantoj en la Jerusalemaj montoj, ili preparas la grundon kaj plantas...

Mi diris al ili, ke il revenu al sia laboro. Lacaj ili leviĝis kaj denove ili kliniĝis kaj enmetis malgrandajn arbojn en la teron, ili rektiĝas kaj iras antaŭen. Supren sur la monton, al la proksima truo. Ankaŭ mi kliniĝis kaj plantis unu arbeton. Mi alvokis al ĝi: „Sanul!” Kaj poste mi ne sciis, kiun arbon mi plantis, ĉar ĉiuj tre similis unu al alia. Kaj ŝajnis al mi, ke ilin ĉiujn plantis mi.

Alproksimiĝis la vespero kaj la laborantoj revenadis al siaj hejmoj. La monto restis tute silenta, vento ekblovis tie kaj moviĝis branĉojn de la granda kerobo, staranta supre sur la monto, forlasita kaj sola. Ĝi rigardas al la malproksimaj altaĵoj, ĝi estas frato de ĉiuj tiuj solecaj keroboj sur supraĵoj de la montoj ĝis tiu unuopa kerobo en la malproksima

distrikto Eĉjon. Ili ĉiuj kune estas kamaradoj-gardistoj.

Dum tiu ĉi nokto tamen ili ne plu estis forlasitaj. Sur la monto estis krom ili ankoraŭ miloj da malgrandaj arboj, altaj dudek kvin centrimetrojn. Dum tiu ĉi nokto sendis la malgranduloj jam siajn radikojn en la teron kaj etendis sin tie kaj tie tra la rokoj. Ili trinkis el la tero kaj kiam ilin retrovis matene la kompatema suno, ili jam estis kune kun la tero — ili jam estis unuiĝintaj kun ĝi. Ili fariĝis fratoj de la solecaj malnovaj keroboj, iliaj heredantoj. Kaj ili alvenis, eĉ ne sciante kiel, ne estante de iu atendataj. Ili estas fratoj de la delikataj pistakuloj, kiuj gardestaras memore al prantikvaj arbaroj el tagoj, kiam estis tie Lando Judea kun multaj homoj sur ĉiu monto kaj en ĉiu valo, kaj en ĉiu terparto konvena por kulturado.

De malproksimo silentis la montoj, kvazaŭ ili estus samaj, kiel ili estis hieraŭ kaj antaŭhierau, tiel dezertaj, ke ili vekis respekton antaŭ sia majesto, kun grandaj rokoj, skulptitaj kiel fortikaĵoj de la montopintoj. Ili tamen ne plu estas la montoj hieraŭaj kaj antaŭhierauaj, ĉar kreskas sur ili jam malgrandaj arbaroj. De malgrandaj arboj. De multaj verdaj arboj.

El la hebrea: O. Ginz

Klarigoj:

Jemenidoj — hebreaĵoj el Jemen, araba ŝtato en suda Arabio. Preskaŭ ĉiujn — 50.000 — savis Izraelo antaŭ perejo, transportinte ilin per aeroplanoj al sia lando. Araboj ne permesis transporton tra sia teritorio.

Kurdoj — hebreaĵoj, vivintaj inter kurdoj en Kurdistanio, lando dividita inter Irano, Irako kaj Turkio.

Irakanoj — hebreaĵoj el Irako.

Sekaj riverkuŝejoj — „vadi”-oj, kie fluas akvo nur vintre kaj kiuj sekiĝas dum la senpluvaj monatoj.

Ejlat — havenurbo sur Ruĝa maro.

ESPERANTISTA VIVO

Naskigoj

Hršel. Naskiĝis la 14an de januaro en Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo, Jan Hršel, frateto por denaska esperantisto Zuzanjo.

Rossetti, tria ido de karola kaj reto rossetti, mi debutis la 22an de septembro 1956, oni pardonu ke mi malfrue anoncas min sed esperanto ne estas tiel rapide lernebla kiel pretendas mia patro. — paul r.

Gefianĉigo

Milanowski-Dassow. En Berlino je Kristnasko 1956 gefianĉiĝis ges-roj Gün-ter F. A. Milanowski kaj Erika Dassow.

Jubileo

Nia membro f-ino Johanna Doering (eks-instruistino), Schlieperstr. 29, Berlin-Tegel, Germanujo, honora membro de la Esperanto-Ligo Berlin kaj de la distrikta grupo Verda Nordo, festis la 7-an de Sept. 1956 la 90-an datrevenon de sia naskiĝtago en plena spirita freŝeco.

NEKROLOGO

Le Brun. En Kreuzlingen mortis la 13an de decembro 1956 samideano Paul Le Brun, 80-jara. Krom aliaj verkoj li kuntradukis „Ĉe la sanktaj akvoj” kaj laste „Tartarin de Taraskono”.

Chaler Mur. Joan Chaler Mur, filo de la Delegito de UEA en Tarrasa, forpasis la 19an de januaro 1957, pro cerbatako, en la aĝo de 40 jaroj.

Omlor. Samideano August Omlor, eks-Regiona Prokuroro. Delegito de UEA en St. Ingbert, Sarlando, mortis la 29an de decembro 1956. Kormalsano atakis lin. **Peltek.** La 25an de decembro 1956, en aĝo de 44 jaroj, mortis post sufiĉe longa malsano samideano Oguz Peltek, malnova esperantisto en Ankara, Turkujo.

TUTMONDA ADRESARO DE KOLEKTANTOJ

La dua Informilo de la Tutmonda Unio de Kolektantoj (TUK) ĵus aperis, alportante al ĉiuj kolektantoj, la unuajn reagojn de interesuloj, en ĉiuj kolektorondoj: filatelajoj, glumarkoj, alumetetikadoj ktp.

Tiun duan Informilon akompanis longa demando, cele de baldaŭa aperigo de TUTMONDA ADRESARO, kies enlistigo de viaj nomoj kaj adresoj estos absolute senpaga.

La celo de la TUK ne estas la malaperigo de la jam ekzistantaj asocioj de Kolektantoj, sed ilia kunlaborigo kaj la ĉiuspeca servado de la kolektantoj, por ĉiaj kolektoj. La informilojn no. 2; 3 kaj 4 vi ricevos laŭorde de aperigo, sendante TRI intern. respondkupononjn al S-ro J. DALET, 79 bis Avenue du Château, ASNIERES (Seine), Francujo.

Alvoko

al la instruistoj

Churchill: Malofte tiom multe dependis de la aktiveco de tiom malmultaj.

Kaŭze de la sugesto de UEA kelkaj instruistoj en Stockholm, Svedlando, proponis al sia lerneja direkto komenci provinstruadon de esperanto en kelkaj klasoj. La provoj celas pruvi, ĉu esperanto kiel unua (baza) lingvo plifaciligas la postan studadon de fremdaj naciaj lingvoj. La lerneja direkto kaj la tutlanda eduka ministerio tre interesiĝis pri tiu propono, kiu laŭ la plano realiĝos en la venonta aŭtuno. Per tiu provo en malgranda skalo (partoprenos en la komenco nur 2 klasoj) la enkonduko de la internacia lingvo en la lernejojn transiris al nova epoko.

La ĝisnunaj kursoj en la lernejoj, ofte post la deviga lerneja labortago, donis la fundamentojn de tiu nova agado. La oficialigo de la provoj ek de nun ebligas kaj devigos la edukajn instancojn rigore sekvi, kontroli kaj ankaŭ publikigi la rezultojn. Kaj laŭ la rezultoj la nomitaj instancoj faros siajn konkludojn.

Tial estas esence grave, aparte je la unuaj provoj, ke nur tre kompetentaj instruistoj gvidu la kursojn, ĉar laŭ ilia laboro dependos la estonta evoluo de tiu instruado. Aliflanke, se tiu proponita esperanto-instruado estos en la manoj de lertaj instruistoj, la rezulto laŭ mi ne povos esti malsukcesa. Sed la rezulto estos ne nur, ke la lernantoj pli facile poste lernos aliajn lingvojn, ili krome konservos por la tuta vivo siajn sciojn de esperanto, akiritajn dum proks. 150 lecionoj.

Por ke tiu ĉi nova metodo ricevu plenan sukceson estas grave, ke similaj provoj (kun minimume 4 lecionoj en la semajno dum tuta studjaro) okazu ankaŭ en aliaj landoj. Kaj la rezultoj en la diversaj landoj poste apogos unu la alian tiomgrade, ke ni en la nuna momento eĉ ne povas imagi al ni la konsekvencojn.

Mi jam turnis min pri tiu ĉi afero per cirkulero al la estraroj de la landaj asocioj, sed evidente ili havas aliajn zorgojn kaj ne estas pretaj ion entrepreni. Tial mi nun turnas min rekte al la unuopaj instruistoj kun la peto, ke ili tre serioze studu la eblecon proponi al siaj lernejoj aŭtoritatuloj provinstruadon de esperanto. Tiamaniere la instruistoj sur sia kampo faros gravegan servon, kaj samtempe la landaj asocioj laboru en aliaj direktoj.

Al instruistoj, kiuj havas intereson pri la nova metodo, mi volonte sendos detalojn pri la tuta plano. Mi aparte direktas min al tiuj instruistoj, kiuj laboras en grandaj urboj, kaj kiuj povas iom facile havi kontakton personan kun gravaj kaj influricaj lernejaĵaj direktoj.

E. MALMGREN,
Komisiito de UEA,
Heleneborgsgatan 6, Stockholm

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefona ARNold 90-81

15.101 ELENDOJ EN ESPERANTO POST LA MILITO

Sinjoro G. Larglantier, la kunlaboranto de CED por radio, ĵus finis sian esploron rilate la Esperantlingvaj elsendojn en la postmilitaj jaroj. Li el-laboris detalajn tabelojn por ĉiu jaro kun indikoj pri la stacioj, kiuj elsendis en Esperanto, nombro de elsendoj kaj ilia daŭro. Entute, inter 1945 kaj 1956 inkluzive, estis 15.101 elsendoj, kiuj daŭris kune 3.411,15 horojn. Laŭ la jaroj la nombro de elsendoj estis: en 1945 - 452, en 1946 - 1.006, en 1947 - 1.616, en 1948 - 2.041, en 1949 - 2.276, en 1950 - 1.466, en 1951 - 1.052, en 1952 - 740, en 1953 - 844, en 1954 - 1.012, en 1955 - 1.168, en 1956 - 1.428. Tiujn elsendojn faris entute 38 radiostacioj el 20 landoj, kompreneble ne ĉiuj dum la tuta periodo. Oni rimarkos ke la plej granda nombro de elsendoj estis en 1949. En tiu jaro la ĉeĥoslovakaj stacioj Praha, Ostrava, Hradec-Kralove, plue Warszawa kaj Budapest havis 1.136 elsendojn, do duonon de la tuta nombro. En la sekvantaj jaroj tiuj stacioj, pro politikaj kaŭzoj, ne plu elsendis en Esperanto. La plej malgranda nombro de elsendoj estis en 1952. Post tiu jaro, paralele kun la ĉiam pli intensa revigligo de la Movado, konstante kreskis la nombro de la Esperantaj elsendoj por atingi la kulminon de 1.428 en 1956.

ELDONO DE LA DOKUMENTO CED/5

Okaze de la 70-jara datreveno de la publikigo de la verko de Zamenhof „Internacia Lingvo“, CED eldonis specialan, eksterserian dokumenton sub la titolo „Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo“. La dokumento en konciza formo prezentas la

ĉefajn atingojn de Esperanto en la 70 jaroj de ĝia ekzistado. Ĝi estas sendita al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj en la angla lingvo. S-ro Lienhardt el Mulhouse, en kunlaboro kun UEF en Parizo, eldonos la dokumenton presite ankaŭ en la franca lingvo. CED sendis la Esperantan tekston de la dokumento al ĉiuj landaj asocioj kaj sugestis al ili eldoni ĝin ankaŭ en aliaj naciaj lingvoj.

ESPERANTLINGVAJ TRADUKOJ EN „INDEX TRANSLATIONUM“

Ĵus aperis la 8-a volumo de la gravega verko de UNESKO „Index Translationum“, kiu entenas bibliografion de ĉiuj tradukoj. Tiu ĉi volumo havas 664 grandformatajn paĝojn kaj en ĝi troviĝas ankaŭ ĉiuj esperantlingvaj tradukoj, publikigitaj inter 1945 kaj 1955. Kiel ni informis pli frue, CED siatempe liveris al la redakcio de „Index Translationum“ kompletan bibliografion pri la esperantlingvaj tradukoj. Tiun grandan laboron kun admirinda precizeco plenumis la kunlaboranto de CED s-ro William Auld.

En la enkonduko al la 8-a volumo la redakcio esprimas sian dankon al la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA pro la helpo donita.

ALVOKO AL UNIVERSITATAJ PROFESOROJ ESPERANTISTOJ

CED deziras konsiderinde larĝigi la reton de siaj kunlaborantoj. Tial ĝi petas iujn alte kvalifikitajn esperantistojn, kiuj laboras en la universitatoj, sciencaj akademioj kaj similaj institucioj kaj kiuj estas pretaj per siaj sciencaj kontribuoj helpi al la laboro de CED, anonci sin al ĝia direktoro, 77 Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex. CED tute speciale direktas tiun ĉi peton por kunlaboro al universitataj profesoroj, docentoj kaj asistantoj de lingvoscienco, sociologio, psikologio kaj internaciaj rilatoj. Ilia kunlaborado estos tre bonvena, en la sekvantaj jaroj vere necesa.

La Universala Ekspozicio

Sekve de alvokoj en la numeroj februaro kaj aprilo 1954 kaj postaj de la revuo Esperanto, fare de CED, multe da materialo estis sendita cele al la Esperanto-Ekspozicio en Montevideo.

Post tiu ekspozicio UEA decidis konservi kaj ordigi tiun materialon por, en formo de Universala Ekspozicio, uzi ĝin en diversaj partoj de la mondo kie tio estas dezirinda kaj ebla. Tia ekspozicio jam funkciis en Strasbourg kaj Kopenhago, kiel sciante.

En la nuna momento la materialo troviĝas en la oficejo de

UEA en Rotterdam, kie ĝi estas prizorgata kaj kompletigata.

Kvankam la kvanto da ricevita kaj konstante ricevata materialo estas granda, la tuto ankoraŭ ne povas atingi la nivelon kiun celis CED kaj UEA. Krome, dum la okazigitaj ekspozicioj multe da materialo perdiĝis.

Tial ni renovigas nian alvokon al ĉiu unuopa esperantisto, al ĉiu organizajo, por ke ili sendu disponeblajn, ne plu aĉeteblajn ŝlosilojn, lernolibrojn, vortarojn, literaturajn verkojn (speciale antologiojn) kaj ĉion uzetablajn por pravi la uzatecon de Esperanto. Specia-

lan alvokon ni direktas al eldonejoj, por ke ili sendu po unu ekzemplero de siaj eldonaĵoj kaj estonte konstante sendu unu ekspozician ekzempleron de ĉiu nova eldonaĵo, tiel ke la konsisto de la ekspozicio restu aktuala. Sendontoj estas petataj sendi la pakajojn kun kompleta listo de la entenata materialo al la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

Al ĉiuj sendontoj koran antaŭdankon!

*J. Calado,
speciala komisiito de la C.O.
por la ekspozicia materialo.*



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

MALLONGAJ INFORMOJ

La 13-a Internacia Junular-Kunveno okazos en Avignon en la semajno antaŭanta la Universalan Kongreson. Samtempe okazos en Avignon teatra festivalo, tiel ke la Kunveno havos eksterordinaran teatran programon, al kiu povos doni sian kunlaboron ĉiuj grupoj tion dezirantaj. Ero de la programo estos oratora konkurso. *Detaloj sekvos*, ĉi tie kaj en la aliaj Esperantistaj gazetoj.

★

En la (franclingva) programo de la 6-a Tutmonda Festivalo de la Junularo kaj de la Studentoj, okazonta en Moskvo de la 28-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto 1957-a, estas menciita en paĝo 4, inter la renkontiĝoj laŭ interesoj, renkontiĝo de Esperantistoj. Por ke tiu renkontiĝo estu utila al nia afero, ni konsilas la samideanojn, kiuj jam havas personajn rilatojn kun sialandaj instancoj interesiĝantaj pri la Festivalo, doni al tiuj instancoj kiel eble plej multajn informojn pri nia movado, akcentante la gravecon de tiu aranĝo; tiuj, kiuj deziras havi informojn pri la Festivalo, skribu en *Esperanto* (verŝajne la respondo venos en alia lingvo, sed Esperanto estas komprenata) al Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo, Benczur-U, 34, Budapeŝt VI, Hungarujo, petante ke almenaŭ unu numero de ĝia bulteno „Festivalo” (franclingva) aperu en Esperanto, demandante, ĉu estas en Moskvo rendezuejo por esperantistoj, ĉu la himno de TFDJ havas Esperantan tradukon (je nea respondo oni atentigu, ke polaj samideanoj ĝin verkis), ĉu okazos ekspozicio de esperantaĵoj, ĉu okazos parolado pri Esperanto, ĉu oni ludos teatraĵojn en Esperanto aŭ ĉu oni povos vidi filmon en Esperanto (oni povas diri ankaŭ, ke oni konas grupon pretan prezenti teatraĵojn aŭ filmon, donante la precizan adreson. La Esperantistoj partoprenontaj en la Festivalo nepre informu pri sia esperantisteco la koncernan sialandan instancon, kaj *petu*, ke oni uzu *ilin kiel interpretistojn*; tiuj, kiuj kontaktas kun gazetoj aperigontaj informojn pri la Festivalo, klopodu, ke tiuj gazetoj raportu ankaŭ pri la esperantista aranĝo en siaj artikoloj pri la preparoj kaj pri la disvolviĝo de la Festivalo.

★

Ĉar evidentiĝis, ke multfoje estas embaraso por la junularaj grupoj la plenumota programo, estos bonvenaj artikoloj pri spertoj de (junular)grupa vivo aŭ ankaŭ pri simplaj sugestoj. La plej interesaj estas (tute aŭ parte laŭ la longeco kaj la spaco) publikigataj en „La Juna Vivo”.

TEJO-SKISEMAJNOJ 1956-57 EN WERFENWENG ĈE TENNENMONTARO

Kiel planite, tiel farite! La TEJO-skisemajnoj ankaŭ ĉi-jare estis bela aranĝo kaj bona sukceso. Malgraŭ ke ni pro troa malmulto da aliĝoj devis nuligi la kontrakton kun Dienten am Hochkönig, ni tamen trovis sambelan loĝigadon en Werfenweng (ĉe Salzburg).

Partoprenis 12 geamikoj el Aŭstrujo, Francujo, Germanujo kaj Italujo.

Ni loĝis kaj manĝis en tute nova, granda alpgastejo, ĉirkaŭata ĉiufanke de majestaj montoj.

Ni skiis, kantis, dancis, ludis kaj amuziĝis. Estis nuraj ferioj. Sed la entuziasmo estis tiel granda, ke unuanime estas decidite, rearanĝi la TEJO-skisemajnojn venontvintre, eble en la Dolomitoj.

Ĉu ni rajtas inviti vin jam nun? La dato ree estos la sama: de la 26-a de decembro 1957-a ĝis la 6-a de januaro 1958-a. La prezo kiel ĉiam estos denove laŭeble malalta.

Jes, uzu la okazon, amik(in)o, kaj jam nun planu vian partoprenon. Sed antaŭe mi esperas, ke multaj el ni renkontiĝos dum la Internacia Junular-Kunveno en Avignon.

Heinrich Reiter, vicprezidanto de TEJO, gvidanto de la Skisemajnoj.

Noto de la Redakcio: *Ni ne volas forpreni de niaj legantoj la ĝuon de almenaŭ parteto el la cirkulero, per kiu nia vicprezidanto donis la lastajn instrukciojn al siaj skiemuloj; do ni citas: „Bonvolu kunporti: Kantarojn, muzikinstrumentojn (escepte fortepianon), konceptojn por vesperaj ludoj. Neĝon ni mem havas!”*

ANKORAŬ PRI LABORKAMPOJ

S-ro Thomas Woodall, membro de la Internacia Civila Servo, estas klopodanta por enkonduko de la uzo de Esperanto en la labortendarojn de ICS, kaj nuntempe li trovis kunlaboron en aliaj Esperantistoj, membroj de la sama organizo. De lia letero ni ĉerpas la suban informon:

Dum la pasinta somero nia angla samideano David Hogget partoprenis laborkampon apud Linz (Aŭstrujo) organizitan de Unuiĝintaj Nacioj. La lastan tagon li suferis gravan akcidenton kaj estas jam de kvin monatoj en mal-sanulejo. Li ne povas respondi al leteroj, ŝajne li ankoraŭ ne povas skribi, sed sendube lin ĝojigos salutleteroj. Skribu

al David Hogget, Lodge Moor Hospital, Sheffield, Britujo.

David eklernis Esperanton en laborkampo en Francujo; dum du jaroj li partoprenis laborkampon en Hindujo kiel sendito de la brita branĉo de Internacia Civila Servo; intertempe en Hindujo li aliĝis al Bhoodan, la movado gvidata de Vinoba Bhave, kiu kolektas terpecojn kaj ilin disdonas al malriĉaj kamparanoj.

4-a INTERZONA RENKONTIĜO BERLIN 1957

Esperanto-Junularo-Berlin, landa ligo de Germana Esperanto-Junularo, la kvaran fojon invitas la Esperantistojn el okcidento kaj oriento de Germanujo kaj el eksterlando al sia Interzona Renkontiĝo, okazonta dum Pasko (19-22 de aprilo 1957) en la lernejo por junularestroj „Rupenhorn” en okcidenta Berlino.

Kotizo (inkluzivanta loĝadon kaj manĝojn): Por gejunuloj sub 25 jaroj 14.— gm.; por pliaĝuloj 18.— gm.

Adreso por aliĝoj kaj salutleteroj: Esperanto-Junularo Berlin, Richardstr. 61, Berlin-Neukölln, Germanujo. Petante informojn bonvolu aldoni internacian respondkuponon.

Karaj geamikoj, partoprenu multnombre la Interzonan Renkontiĝon en la germana ĉefurbo; atendas vin valora programo kun klerigaj kaj amuzaj eroj: *Berlin valoras vojaĝon!*

ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO (EJS)

Niaj du skirestadoj en Adelboden.

Tiuj du skisemajnoj vere majstre sukcesis danke al belega neĝo, agrabla vetero, konvena loĝejo kaj simpatiaj partoprenantoj. Nia loĝejo: simpla alpa ligna kabano estis ideala junuldomo. Se la kuirejo aspektis iom mezepoka kaj pleniĝis ofte per fumo, la aliaj ĉambroj bone varmiĝis sen fumado. Du litĉambroj kun ses litoj estis rezervitaj al niaj kamaradinoj, dum la junuloj dormis en granda dormejo.

Ĉiutage, kiam ne neĝadis, la partoprenantoj dividiĝis en du aŭ tri grupojn laŭ ĉies skipovo. Ni ĉiam regrupiĝis por la tagmanĝo en unu el la montrestoraci-



Nia ĉaledo en Adelboden

oj: momento ridoplena kaj ĝojega; estis tiom por rakonti!

Post bona vespermanĝo la vespero ĉiam komenciĝis per mallonga esperanto-kurso dediĉita al la komencantoj. Poste venis la kantoj, la ludoj, la dancoj, la diskutoj... kaj la festoj: Kristnasko, Novjaro, Epifanio.

1956

Tiu manifestacio sukcese fermis nian 1956-an jaran laboron. Por la Esperanto-Junularo de nia lando 1956 certe restos memorinda jaro, ĉar ĝi vidis la unuajn semajnfinojn, la unuajn paŝojn de nia nova organo „La Juna Voĉo“, la unuan teatraĵeton luditan de junuloj dum la Svisa-Esperanto-Tago. Tiu laboro alportis al ni multajn valorajn novajn junulojn, kiuj ĉiuj fervore ne nur komencis lerni nian lingvon, sed daŭrigis la studadon.

1957

En Adelboden ni ankaŭ malfermis la novan jaron en ĝojega samideana atmosfero. Tio certe alportos al nia mo-



Kelkaj el la partoprenintoj ĉe la supro de monto.

vado ŝanĉoplenan jaron, tion almenaŭ ni esperas.

Kiel lastjare nia movado organizos ĉiumonate malmultekostan semajnfinojn.

En februaro vokos nin Berno al sia interesoplena manifestacio: vizito al la urba biblioteko (kie laboras samideano kiel fotografistino); sorĉaĵoj, vizito al nia Svisa Parlamentejo, kaj kiel kutime ludoj, kantoj, diskutoj... En marto ni iros al Aarau. En majo al Estevayer-le-Lac.

Do, se junulo el eksterlando trapasas nian landon, li nepre devas sin anonci al Esperanto-Junularo, Crêt 78, La Sagne (Neuchâtel) por informiĝi, ĉu li povos partopreni unu el tiuj renkontiĝoj.

TEJO

Ni estis jam de kelkaj jaroj aliĝintaj al TEJO, sed tute nenion sciis pri ĝia vivo, ĉar ni eĉ ne ricevis ĝian gazeton. Ni ĝojas vidi, ke la nova TEJO ŝajnas iom pli vivoplena kaj ni estas pretaj fari ĉion eblan, por ke TEJO sukcesu en sia programo.

*Esperanto-Junularo de Svislando
Junulara Sekcio de Svisa
Esperanto-Societo*

Granda artisto de Provenco, la kongresregiono

Ceranne

Pentristo malbenita

NOTO DE LA TRADUKINTO:

Ŝatantoj de fama artisto konas du ĝuojn: unue, la verkojn admiru; due, repaŝi sur la paŝojn de la majstro amata. Tiun duan ĝojon povos koni la kongresanoj de la 42-a en Marseille, amantoj kaj admirantoj de la mondĉama Provencan pentristo Paul CEZANNE. Post duonhora veturado per rapida aŭtobuso, ili jam ripozos sub la „freŝa ombro“ de Cours MIRABEAU, en AIX EN PROVENCE, la urbeto juvela, kaj naskiĝloko de „Sinjoro CEZANNE“. Sub la platanoj, lastjarcente, ofte pasadis ĵiakra malrapida, hirta pro stabloj; en ĝi sidis nigra, barbhaveca figuro sub ĉapelo cilindra.

Piede ili atingos la patran domon kaj iaman laborejon de la pentristo, „Jas de Bouffans“; ĝi nun iĝis muzeo, kie pie konserviĝas memoraĵoj: stabloj, pentikoj, paletroj. Eĉ videblas granda fendo vertikala en la muro, de CEZANNE postulita por el kaj enŝovi la tro grandformatajn pentraĵojn.

Sed al la ŝatanto ĉefe parolos la kamparo mem. Laŭ lia kapricaj vojetoj, kiuj kondukas al Monto Sainte-Victoire, li sekvas la ombbron de la majstro. La olivarboj, la cipresoj, la grundoj rustaj, la blankaj rokoj, la migdalarboj, ĉio tie ĵiustros en liaj oreloj pri la lukto ĵurioza, silenta, senĉesa, per kaj kontraŭ la formoj kaj koloroj, al la celo ĉiam fuĝanta.
J. Beau.

En fremdaj landoj, eksterordinare fama estas nun CEZANNE. Amerikana kolektanto aĉetis la „Kartfludantojn“ por 240.000 dolaroj, kaj tio okazis en 1936. Tiel altaj aŭkciaj proponoj nepre ege surprizus CEZANNE, se li nun paŝus inter ni. Ĉar dum sia vivo li devis akre klopodi, por ke oni lin traktu serioze. Kiam ajn li donacis pentraĵon al amiko, tiu-ĉi hasteme portis ĝin al la mansardo. Se la amiko estis pentristo, li forskrapis ĝin, por ĝin sen elspezo reuzi. Kiom da verkoj de CEZANNE tiel perdiĝis? Hodiaŭ, je tia penso, tremas la amatoroj. La majstro mem, de tiel persista nesuk-

ceso vundita, ne alte taksis siajn verkojn. Dum liaj oftaj kolereksplodoj, li freneze manumis la paletroskrapilon, kaj krevigis verkon post verko; nur tiel li kapablis kvietiĝi; poste, trankviliginte la nervojn, li povis reeklabori.

La vivo de CEZANNE estas tiel interese, tiel animtuŝa, tiel romaneca unuvorte, kiel ekzemple tiu de VAN GOGH. Tre stranga estis la homo. Tiel nestabila, ke li senĉese transloĝiĝis. Feliĉe, ke tiam ankoraŭ ne ekzistis niaj loĝproblemoj. Se oni entreprenus, alnajli platojn memorajn sur ĉiuj liaj domoj, necesus dekoj kaj dekoj da tiaj, en AIX, en MARSEILLE, en PARIZO, en la regiono de PONTOISE kaj de FONTAINEBLEAU. Ĉio lin incitis, kaj nenian bruon li kapablis toleri. Stratvendisto kriante sub lia fenestro sufiĉis por ke li iru por serĉi aliloke la neeban silenton. Liaj postuloj limtuŝis manion. Por ke li povu labori, necesis, ne nur tomba silento, sed krome helgriza ĉielo, plaĉa enteno de la ĉiutaga gazeto, kaj kontentiga rezulto de matena studo de la Grandaj Majstroj. Tiuj diversaj kondiĉoj, ĉu necesas tion aldoni, nur malofte kuniĝis.

En la ĉiutaga vivo, CEZANNE estis tute senarmila. La plej malgranda iniciato trovis lin sendecida. Pro ĉio kaj nenio li rediris: „Terura estas la vivo!“ Li timis la virinojn nevenkeble, nepra ĝenaĵo por pentristo, kiu utiligas profesiajn modelojn. Lia pudoro ne povis toleri, ke virino senvestigu sin antaŭ li. Tial fine li forsendis la modelojn. Tamen li abunde pentris la virinon, sed por tion fari, li helpis al si per krokizoj faritaj laŭ la Majstroj, aŭ — strangete — li provis kaŝe desegni la soldatojn de la garnizono, sin banantajn en la rivero ARC, apud AIX fluanta.

Mensa ekvilibro, oni vidas, ne estis la ĉefa kvalito de CEZANNE. MONET¹⁾ iam invitis lin al sia domo de GIVERNY, por tie renkonti



Cézanne:

Memporetro

RODIN²⁾). Post la manĝo, kiam la grupo promenadis en la ĝardeno, CEZANNE subite surgenuiĝis antaŭ RODIN, meze de aleo, por danki lin ĉar li estis preminta lian manon!

Tiajn anekdotojn oni povus amase kolekti. Kiam la pentristo vojaĝis tra Svislando kun sia edzino kaj filo, li iun tagon ĉeestis en FRIBOURG sole-naĵon, kiu malplaĉis al li, kaj li subite malaperis en la homamason. Nur post kvar tagoj alvenis letero el Genevo: CEZANNE, drivinta ĝis tiu urbo, kaj fine trankviliĝinta, petis ilin tien.

CEZANNE laboradis treege malrapide. Li bezonis monatojn kaj monatojn por fini pentraĵon, kaj eĉ tiam ne estis kontenta pri sia laboro. La komercisto pri pentraĵoj Ambroise VOLLARD deziris, ke CEZANNE faru lian portreton. La kompatindulo ne imagis, kiom da pacienco tiu portreto kostos al li. Nur post cent dekkvin sidadoj de tri horoj kaj duono CEZANNE forlasis sian taskon. La komercisto demandis, ĉu li estas kontenta, kaj CEZANNE, rigardante sian verkon, nur respondis: „Mi ne estas malkontenta pri la fronto de la ĉemizol!”

CEZANNE mortlacigis siajn modelojn. Li ja postulis ŝtonan senmovecon. Ili devis sin teni „kva-zaŭ pomo”. Iun tagon, post plurhora tia senmoveco, svenis juna knabo. Cetere, CEZANNE havis siajn personajn metodojn. VOLLARD, alveninte ĉe la artisto por la unua sidado, multe miris ekvidante, en la mezo de la laborejo, podiaĵon por li de la pentristo preparitan: seĝo staris sur kesto, tiu lasta apoganta sin sur „kvar malfortikaj piedaĵoj”. VOLLARD maltrankviliĝis, sed CEZANNE diris: „Tute ne danĝeras, sinjoro VOLLARD; vi ne

falos, se vi konservos vian ekvilibron.” Ili eklaboris; malfeliĉe VOLLARD tuj poste ekdormis; li falegis kune kun la seĝo, kesto, kaj kvar apogiloj; konsternite, CEZANNE ekkriis: „Mallertulo! vi fuŝas la pozon!”

Kvankam li senfine prilaboris siajn verkojn, CEZANNE havis neniun sukceson. Nur kvindek-jara li estis iom ekŝatata. Neniam paciĝis liaj malamikoj ĝis lia morto. Malmultajn artistojn oni tiel riĉe insultis. Korprema estas la legado, en la gazetoj kaj revuoj de tiu epoko, de la fendaj recenzoj pri liaj ekspozicioj. Laŭ la tiamaj recenzistoj, CEZANNE estas „artisto retinmalsana”, „malsaĝa artisto”, „ebria kloakisto”. Liaj verkoj transpasas „la limon de la leĝe permesataj mistifikaĵoj”. Ilin ekvidinte, oni sentas nur unu haston: „fuĝi, fuĝi rapide, kaj eskapi la inkuban vizion de tiuj oleaj kruelaĵoj”. Oni povus pleniĝi ducent paĝojn, kolektante tiajn juĝojn pri la verkoj de CEZANNE. Pro tio la tuta vivo de la pentristo estis vere kalvario. Dum jaroj, li rajtis dubi, ĉu li ja estas la artisto laŭ sia kredo, artisto destinita por la Muzeo „Louvre”, aŭ nur aĉa ŝmiristo. En lia koro rodis la duboj. Al neniu li povis konfidi sian doloron. Eĉ lia plej bona amiko, Emile ZOLA, samlernejano, ne kredis je lia genio, eĉ ne je lia talento. ZOLA, multlegata skribisto, estus povinta lin helpi kaj ĉampioni per sia plumo. Ho! ve! Tio tute ne okazis. ZOLA ne nur ne helpis CEZANNE, nenion skribis por altiri la atenton sur lin, sed eĉ faris lin la heroo de sia romano „La Verko”, kiu ja temas pri pentristo fiaska kaj senpova. Post la apero de „La Verko” CEZANNE neniam revidis ZOLA.

Pri iuj estuloj oni diras, ke ili havas nenan bonŝancon. Tia certe estas CEZANNE. Nenio en lia vivo ne fuŝiĝis. Li ne konis eĉ la konsolon de virina amo. Li estis edzo, sed lia edzino, kiu tute ne komprenis lian verkadon, plejofte vivis for de li. Kiam li deziris, ke ŝi revenu dum tempo, li devis ĉesigi la monsendojn. Plie, kiam li estis kvindek-jara, la malsano lin ekturmentis: diabeto ĝi estis, de kiu li multe suferis dum la lastaj jaroj. Sed li pentris plu. Li pentris kun kreskanta obstinemo. Pentrado, lia nura plezuro. Pentrante li forgesis ĉion, la sarkasmojn, la insultojn, sian solecon, eĉ la ŝtonojn kontraŭ lin ĵetitajn de stratoknaboj, kiuj kriadis: „Iru kaj pentru kaĝojn!”

Hodiaŭ CEZANNE estas gloro inter la gloroj de la franca pentrarto. Malmultajn artistojn de nia duonjarcento li ne influis. Liaj verkoj estas la fiero de la muzeoj en la tuta mondo, kaj de la grandaj kolektantoj. La gloro, malfrue, venis. CEZANNE, kiu nur malklare videtis ĝian venon dum la lastaj tagoj, estis paginta al ĝi grandan doloran tributon.

HENRI PERRUCHOT

¹⁾ Konata franca pentristo 1840—1926.

²⁾ Franca skulptisto 1840—1917.

HENRI PERRUCHOT, la verkisto de la supra artikolo, estas aŭtoro de tre ŝatata vivo de Cézanne: „Vie de Cézanne”, Hachette 1956, 432 p., 900 fr. fr.

REPREZENTANTO DE UEA PREZIDAS KUNVENON DE NRO EN LA UNESKO-DOMO

La 6-an de februaro okazis en la UNESKO-Domo en Parizo kunveno de la reprezentantoj de Neregistaraj Organizaĵoj, membroj de la Subgrupo pri la Psikologiaj kaj Sociologiaj Fundamentoj de la Kompreniĝo kaj Kunlaborado Internaciaj. Ĉeestis ĉ. 40 reprezentantoj de neregistaraj organizaĵoj. La kunvenon prezidis la reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio, s-ro Jean Thierry el Parizo. La alia reprezentanto de UEA estis s-ro Pierre Petit, komitatano de UEA.

Post longa diskuto, kiu daŭris la tutan tagon, la kunveno fine elektis malgrandan 5-membran komitaton, en kiun eniris inter la aliaj ankaŭ s-roj Thierry kaj Petit. La tasko de la komitato estas prepari, en kunlaboro kun la Departemento pri Edukado de UNESKO, enketon rilate la sintenon al aliaj nacioj. Pere de la enketo, oni, interalie, esploras la pozitivajn kaj negativajn faktorojn al la internacia kompreniĝo, kaj tute speciale la faktorojn rasan, lingvan, nacian, religian kaj socian. La enketaj folioj estos senditaj al ĉiuj neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. Estas antaŭvidite, ke la laboro daŭros proksimume unu jaron. La celo de la enketo kaj de la tuta laboro estas ebligi al la neregistaraj organizaĵoj fari konkretajn proponojn al UNESKO por plibonigo de la internacia kompreniĝo kaj kunlaborado.

La fakto, ke la reprezentanto de UEA prezidis la kunvenon kaj ke ambaŭ reprezentantoj de nia Asocio estas elektitaj en la komitato, ankoraŭfoje montras la kreskantan prestiĝon de Universala Esperanto-Asocio en UNESKO kaj inter la organizaĵoj kunlaborantaj kun ĝi.

Tra la Mondo

● Por pligrandigi sian interlernejan gazeton, la Kvara Rondo de „Grajnoj en Vento” (vd. ESPERANTO 1956, p. 160) deziras kunlaborantajn lernejojn en jenaj landoj: Britujo, Aŭstralio, Bulgariujo, Nederlando, Pollando, Japanujo, Usono. Por partopreni ne necesas, ke la lernantoj jam scipovu Esperanton; la instruisto aŭ esperantista amiko tradukos. Interesatoj skribu por pliaj informoj al la peranto: S-ro Gabriel Mussier, Instruisto en TRETEAU (Allier), Francujo.

● Jus aperis dua eldono de la sulingva flugfolio „La Internacia Lingvo” de UEA, en lingvoj: angla, franca, germana, hispana, pola, sveda. Oni mendu ĝin por kiel eble plej vasta utiligo en nacilingvaj kongresoj, k.s., ĉe la Centra Oficejo de UEA.

● Aperis la Unua Oficiala Bulteno de la 9a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso, kiu okazos en Rijeka (Jugoslavio) de la 11a ĝis la 17a de majo 1957. Adreso: Poŝtfako 95, RIJEKA.

● **Argentino.** „Universala Religio”, organizo kies celo estas interfratiĝo de la homoj en la tuta mondo sen diferencigo laŭ raso aŭ kredo, adoptis por siaj internaciaj rilatoj la lingvon Esperanto. Ĝi vokas ĉiun homon kun bona volo al la grava tasko de internacia fratiĝo pere de Kredo sen Dogmoj. Adreso: „Universala Religio”, Poŝtkesto C.C. No. 142, Suc. 13-B BUENOS AIRES, Argentino.

● **Britujo.** De la 19a ĝis la 22a de aprilo 1957 okazos la 41a Brita Esperanta Kongreso en Weston-super-Mare, fama sud-okcidenta marborda urbo en la graflando Somerset. Oni bonvenigos esperantistojn ankaŭ el eksterlando, kiuj ne pagos kongresan kotizon. Prezoj de gastoj, privataj domoj kaj hoteloj varias inter po 15 ĝis 30 anglaj ŝilingoj tage. Sekretario: S-ro G. B. Tordoff, 82 Penderennis Park, BRISTOL 4, Britujo.

Post la Kongreso, de la 23a ĝis la 27a de aprilo, la Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj okazigos Paskan Lernejon ĉe bela gastejo en la montetoj Mendip, proksimume 10 kilometrojn for de Weston-super-Mare. Por informo skribu al: F-ino O. Robotham, 14 Wensley Road, STOCKTON-ON-TEES, Britujo.

Okaze de la Kongreso, oni eldonis oficialan broŝureton: „Venu al Weston”, ricevebla ĉe: S-ro V. Turner, Town Hall, WESTON-SUPER-MARE.

● **Bulgariujo.** Fako „Informado kaj dokumentado” de Bulgara Esperanto-Asocio, kun financa helpo de Bulgara Esperanto-Kooperativo, eldonis kartonan kalendareton. Ĝi estas destinita por pagando, kaj pro tio en bulgara lingvo koncize estas dirite pri Esperanto kaj de kie oni povas ricevi pli detalajn informojn pri Esperanto. Eldonnumero 5.000.

● **Ĉeĥoslovakio.** Ni jam raportis pri tio, ke Esperanto estas en alta grado uzata kiel helpilo ĉe la enkonduko de la ĉeĥa literaturo en la ĉinan lingvon. En nova numero de la ĉinlingva revuo I-Wen estas juse publikigita artikolo pri ĉeĥa poeto Petr Bezruč kun traduko de ses el liaj Sileziaj Kantoj. La artikolo mencias la helpon de la ĉeĥaj esperantistoj.

La „Verda Ĉaro de Julio Baghy”, teatra kolektivo de la Esperantista Klubo en Praha, la 12an de decembro honoris la naskiĝtagon de Zamenhof per prezento de du gravaj teatraĵoj. La unua estis la drameto en versoj de Marjorie Boulton: „Ĉe l'akvo de forĝeso”, kiu aperis en ESPERANTO 1956, n-ro 1. La dua estis nova dramo de Julio Baghy „Dum tondras la kanonoj”, verkita por la Verda Ĉaro, kaj dediĉita al ĝia gvidantino Eva Suchardova-Seemannova. Tiu ĉi inda Zamenhofa vespero denove pruvis la eminentajn kvalitojn de la Verda Ĉaro.

● **Ĉinujo.** La Ĉina Esperanto-Ligo estas restarigita. Adreso: Poŝtkesto 77, PEKING.

● **Estonujo (USSR).** En Tallinn nuntempe funkcias 30 Esperanto-kursoj kun pli ol 900 partoprenantoj. En Estonujo nun lernas Esperanton 2000–2500 homoj proksimume, en 50 grupoj. Ŝtata Literatura Centro jam akceptis manuskriptojn de Esperanto-vortaroj kaj lernolibro kun promeso eldoni ilin komence de 1957.

● **Hispanujo.** En la ejo „Ateneo” de vilaĝo Castellar del Vallés prelegis pri Esperanto la 23an de decembro 1956 Akademiano Prof. Delfi Dalmau kaj D-ro Mariano Sola, vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Prezidis la prezidanto de „Ateneo”, D-ro Casanovas. La prelegojn aranĝis la Esp.-grupo de Sabadell.

● **Italujo.** Prof. D-ro Canuto, Prezidanto de UEA, ĉeestis la solenan malfermon de Esperanto-kurso en Livorno aranĝita de la loka Grupo. La kurson partoprenas multnombraj lernantoj.

● **Israellando.** La artikolon „Plantado”, aperintan en nia hodiaŭa numero, traduku en vian lingvon kaj publikigu en vialanda gazeto. Vi tiel helpas la Esperanto-movadon en Israellando. Sendu minimume 2 ekz. de la represo al O. Ginz, Shd. Szold 11, KIRJAT JAM BET.

● **Latvujo (USSR).** La 23an de februaro 1956, en urbo Liepaja, reviviĝis la Esperanto-movado en Latvujo per la energia agado de kvar malnovaj esperantistoj: samideaninoj Lange, Mitmane, Skalde kaj Prof. I. Loja. Post unujara laboro 1000 personoj en la lando nun lernas Esperanton, en Riga, Liepaja kaj aliaj urboj, kaj pere de la revuo „Zvaigzne” (Stelo). En marto aŭ aprilo aperos Esperanto-latva kaj latva-esperanta vortaro.

● **Pollando.** La Direkcio de Ŝtata Porinstruista Mezlernejo en Cieszyn decidis aranĝi por siaj ĝelernantoj kaj instruistoj Esperanto-kurson. La amon lerni Esperanton esprimis pli ol 120, sed la Direkcio elektis nur la plej kapablajn; do la kurson partoprenas 42 ĝelernantoj kaj 3 ĝeprofesoroj. La kurso daŭros 4 monatojn po 4 lernejoj horoj semajne. Ĝin gvidas s-ano JanTichawski. Delegito de UEA.

● **Vjetnamo.** En Hanoi la 3an de oktobro 1956 okazis unua sukcesplena prelego antaŭ 500 ĉeestantoj el la studentaro kaj intelektularo. S-ano Ng-Hai-Trung, verkisto, parolis pri „Esperanto, lingvo de paco kaj amikeco”. S-ano Dao-Anh-Kha, ĵurnalisto, parolis pri „Esperanto, belsona kaj fleksebla internacia lingvo”. Eta ekspozicio estis starigita kun 100 libroj, 50 gazetoj kaj diversaj aĵoj, kaj 200 leteroj. Ĉiuj tri tagjurnaloj: Nhan-Dan, Thoi-Moi, Hanoi, kaj junulara gazeto „Tien-Phong” raportis favore pri la prelego.

La duonsemajna gazeto „Avangardo”, centra organo de Vietnamia Laborista Junularo en Hanoi, publikigis en sia numero de 20.11.56 longan artikolon „Kio estas la internacia lingvo Esperanto”.



42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Marseille — 3.10 aŭgusto 1957 —
Francujo

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves,
Marseille, Francujo.
Telefonaĵoj: PRado 55-46; FErréol 96-18.
Telefonaĵoj: Esperanto.
Banko: James Rosa, Marseille.
Ĝirkonto: Groupe Esperantiste — Mar-
seille n-ro 156-15.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 5 Februaro 1957

Loterio: Al la loterio inter unuaj mil kotizintaj kongresanoj estu aldonitaj kiel novaj premioj kvin abonoj al la gazeto „La Progreso”. La premioj nun atingas entute la nombron de 41.

Nova kunveno: Loka Loĝio de la Rito „Droit Humain” invitas la framasonajn esperantistojn, apartenantajn al kiu ajn Rito, al kunveno dum la Universala Kongreso. Vin turnu al: Hypatie (Esperanto), 24 rue Armand Bédaride, Marseille, Francujo.

Akcepto: La Urbo de Marseille, kunlabore kun aliaj gravaj Institutioj en Marseille, akceptos regale la kongresanojn.

Gazetara Servo: La Kongresa Gazetara Servo, la plej ampleksa el ĝisnunaj, komencis sian informadan aktivecon.

Postkongresa ekskurso: La postkongresa ekskurso vizitos Korsikon, patrujo de Napoleono. La veturado okazos per aviadilo AIR FRANCE.

Kongresa kaso: L.K.K. plu ne akceptas donacojn por la Kongresa Kaso. Donacintoj kaj donacantoj povas elekti inter la Literatura Kaso, Blindula Kaso kaj Adopta Kaso.

Infana Kongreseto: La Dua Internacia Infan-kongreseto, en la kadro de la Universalaj Kongresoj, akceptos dumtage infanojn naskiĝintajn inter la 1-2-1951 kaj la 31-12-1943. Laŭ skriba atesto de la gepatroj, la infanoj parolu Esperanton sufiĉe por interkompreniĝi. La provizora programo antaŭvidas ekskursojn al teraj kaj maraj lokoj de la sunplena Provenco, ludojn, filmprojekciojn, k.t.p. Aliĝkosto por la tuta semajno, inkluzive manĝojn, 3.000.— fr. Por informoj vin turnu al s-ro F. Cadenel, 32 rue George, Marseille, Francujo.

Teatraĵo: Teatra trupo de Marseille kun artistoj el Parizo ludos en Esperanto la teatraĵon „Topaze” de Marcel Pagnol, membro de la „Académie Française”.

Statistiko: (ĝis fino de januaro) Alĝerio 1, Aŭstrujo 13, Belujo 9, Brazilo 3, Britujo 50, Bulgarujo 5, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 18, Finnlando 10, Francujo 222, Germanujo 62, Hispanujo 18, Italujo 94, Jugoslavio 27, Ja-

panujo 2, Maroko 4, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 28, Norvegujo 5, Novzelando 2, Pollando 3, Portugalujo 5, Saarlando 1, Svisujo 16, Svedujo 37, Usono 3. Entute 645 el 27 landoj. (Pasintjare 1080 el 31 landoj.)

Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

Suplemento al la Oficiala Komunikon-ro 5, februaro 1957

POSTKONGRESA EKSKURSO AL KORSIKO (10—23 aŭgusto 1957)
(bonvolu publikigi)

La postkongresa ekskurso al la insulo de belecoj, Korsiko, lando de Napoleono, intencas doni al la kongresanoj la eblecon ĝui en kondiĉoj de granda komforto la naturajn ĉarmojn de tiu Mediteraneo, kiu estas simbolo en la tuta mondo de senkompara poezio.

La vojaĝo okazos per unuaklasa aviadilo AIR FRANCE kaj la ekskursantoj loĝos en unuaranga Hotelo, meze de trankvila parko, en Ajaccio. La programo lasas sufiĉe da libera tempo al la ekskursantoj, por ke ili laŭelekte partoprenu en la diversaj distroj de la banlokoj: ĉefe la vesperoj povas esti gajigataj de multnombraj spektakloj en la CASINO kaj en la tipe korsikaj kafejoj, kie kunvenas la plejparto de la gitaristoj. Dumtage la belaj plaĝoj de Ajaccio proponas sin al plaĉa ripozo post la kongresaj laboroj. Speciala akompananto de la Kongreso sin okupos pri la deziroj de la vojaĝantoj.

Sabaton, 10 aŭgusto

Foriro de Marseille dummatene per turisma aviadilo. Alveno en AJACCIO, enloĝigo en la Hotelo kaj tagmanĝo. Posttagmeze: vizito al la urbo kun akompanado de loka gvidisto: Domo de Napoleono, Muzeo de Napoleono, Imperiestra Kapelo, Muzeo Fleisch (kollekto de Korsikajoj) k.t.p. Promenado ĝis la Pointe de la Parata, de kie oni belege alrigardas al la Iles Sanguinaires (sangavidaj insuloj). Reveno al la Hotelo.

Vespermanĝo. Libera vespero.

Dimanĉon, 11 aŭgusto

Foriro matene. Veturado per aŭtobuso laŭlonge de la Route du Littoral al Cargèse, fondita de greka kolonio.

Rigardado de la greka kaj latina preĝejoj. Alveno al Piana, kun ĝiaj mirindaj „Calanches”, idiliaj fjordetoj rokaj kaj kuriozformaj, ornamitaj de afrikaj kreskajoj, penetrantaj en la maron en la grandioza dekoracio de la Golfo de Porto, plonĝita en tre bela lumeco. Tagmanĝo en Piana aŭ Porto. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera vespero.

Lundon, 12 aŭgusto

Matenmanĝo. Libera mateno. Tagmanĝo kaj foriro al „Circuit du Maquis”, montregiono, kie rifuĝis la banditoj, kiuj mortigis pro kaŭzo de honoro. Reveno al Ajaccio vespere. Vespermanĝo. Libera vespero.

Mardon, 13 aŭgusto

Matenmanĝo. Libera mateno. Tagmanĝo. Alveno al la flughaveno Campo dell' Oro en Ajaccio kaj foriro al Marseille, kie oni alvenas en la vespero.

Prezo: inkluzive vojaĝon per aviadilo, restadon en Korsiko kun kompleta pensio, vizitojn kaj ekskursojn, akompanadon kaj impostojn 31.000.— fr. fr.

Esperanto parolata en Nepalujo dum la kongreso de la Universala Federacio de Budhanoj

Nia cejlona amiko Sanghano Njanasatta informas nin, ke dum sia pilgrimado li reprezentis Ĉeĥoslovakujon en la Kvara Kongreso de la Universala Federacio de Budhanoj (World Federation of Buddhists) en Katmandu, Nepalujo, 14—21-11 1956. La tuta Kongreso estis sub la prezido kaj aŭspicioj de la Reĝo kaj la Registaro de Nepalujo. Dum la unua ĝenerala kunveno, 16-11-1956, la bone konata esperantista pastro budhana, Rev. Rudolf Perti, nun Sanghano Anuruddha el Svedujo, reprezentanto de la Budhana Ligo Esperantista, faris sian raporton en Esperanto, kun sia angla traduko de la parolado.

En la unua kunveno de la Komitato por Publikadoj, al kiu apartenis la du sanghanoj, Prof. Dr. G. P. Malalasekera subtenis la proponon de Sanghano Anuruddha pri uzado de Esperanto. La prezidanto de la Komitato, S-ro Christmas Humphreys tuj petis sian sekretarion, S-rinon M. H. Robins, ke ŝi notu la tekston de la 3-a rezolucio pri uzo de Esperanto en propagando de l' Budhismo. Tiu rezolucio estas nun en la fina raporto, akceptita de la Ĝenerala Konferenco, kaj oni povos legi ĝin, kiam ĉiuj raportoj kaj rezolucioj estos presitaj. Ĝi estas Rezolucio No. (4) (c), paĝo 3 de la mimeografita raporto de la „The Publicity and Publications (Propaganda) Committee Resolutions passed at the General Conference of the World Federation of Buddhists held at Sital Niwas (Vintra Palaco), Kathmandu, Nepal, on 17-11-1956”.

Dum la Kongreso almenaŭ kvin personoj parolis Esperanton.

Granda sukceso de la jubilea kongreso de jap. esp-istoj.

La 43a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazigita la 9-12an de novembro en Tokio memore de la 50a jaro de la organizado de la movado en tiu lando havis plej grandan sukceson.

En la jubilea festo malfermita je la 13a horo de la 10a en la luksa aŭlo de la nove konstruita publika domo de Tiyoda Kvartalo partoprenis 394 gesamideanoj el la tuta lando kaj ankaŭ ĉeestis ĉirkaŭ 70 gastoj kaj journalistoj. Al la festo sendis mesaĝojn la eduka ministro, la prezidanto de la Japana Scienca Konsilantaro, la prezidanto de la Japana Nacia Unesko-Komisiono, la prefekto de la metropolo Tokio, kaj aliaj institucioj kaj multaj eksterlandaj esperantistaj societoj. D-ro Z. Toki, prezidanto de la jubilea komitato (membro de la Akademio de Artoj) donacis memorarojn al s-ro K. Ossaka kaj 35 aliaj veteranoj. Prof. S. Nishi, prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (rektoro de Gunma Universitato) donis jubilean paroladon. Oni prezentis 4 plej altkvalitajn kulturajn filmojn (Ĉeĥoslovakano, Popolĉinan, Anglan kaj Usonan), kiujn bonvolis senpage prunti enportintaj firmoj kaj Usona Kultura Centro.

En la 11a tago oni okazigis interalie simpoziojn en du sekcioj sub la komuna temo „Internacia interŝanĝo de kulturo kaj problemoj de lingvo“. En la sekcio A (Scienca, eduko kaj literaturo) parolis unue gastoj D-ro S. Oketani, asistoprofeso de Tokio Teknologia Instituto, fame konata kritikisto, d-ro K. Hatano, profesoro de Otyanomizu Universitato, eminenta edukpsikologo, s-ro H. Noma, plej distingita progresema verkisto, kies ĉefverko „Vakua zono“ estas lastatempe eldonita en la tradukoj angla, germana kaj franca. Due parolis nia samideano s-ro Z. Kiyasu, inĝeniero de la Laboratorio de Telekomuniko, pri la teknika limo de tradukmaŝino. Denove parolis gastoj s-ro I. Kokubu, plej influa gvidanto de la movado de infanaj verkoj pri vivo, kaj d-ro O. Miyagi, profesoro de Tokio Teknologia Instituto, aŭtoro de plej multe legataj libroj pri psikologio. Sekvis diskutoj inter aŭdintaj esperantistoj kaj la prelegintoj kaj ankaŭ inter la aŭdintoj. Partoprenis en la diskuto interalie d-ro H. Ooshima, membro de la Scienca Akademio, prof. H. Kobayasi, fame konata lingvosciencisto, prof. H. Oka, prof. M. Suzuki, prof. H. Yagi, prof. J. Kawahara, prof. R. Hasegawa, ĉiuj unuarangaj natur- kaj kultursciencistoj, kaj s-ro T. Sasaki, dramverkisto kaj filmaktoro, I. Takasugi, verkisto, d-ro Z. Toki, ktp. Ĉeestis pli ol 200 esperantistoj.

En la sekcio B oni diskutis pri la temo en la koncerno kun internacia korespondo, filatelismo kaj amatora radio. En ĝi partoprenis krom 50 kongresanoj ankaŭ s-ro K. Kazii, prezidanto de Ja-

Marjorie Boulton

4 poemoj pri katido

Preĝo de Katido

Granda diino Basto,
min benu dum mi ludas
kun pilko aŭ kun kvasto,
aŭ la paserojn studas;

kaj benu la orelon,
la kojnon de kompreno,
kaj benu mian felon
per la elektra beno.

Min benu dum mi glutas
la lakton, aŭ per nazo
esploras, aŭ amputas
florkapojn en la vazo;

min en la korbon benu
kiam mi ekvojaĝos;
sekure mi alvenu,
ĉar Vi eterne saĝos;

kaj benu la mastrinon
senvostan en la domo;
pardonu la Destinon
ke ŝi naskiĝis Homo.

★

Gratvundoj

Jes, mia eta kato plene katas;
grimpane aŭ ludante, li min gratas;
amikoj kiuj laudis miajn belajn
manetojn, nun rimarkas la sigelajn
suketojn ruĝajn, diras, „Ho domaĝe!
La katideto vundis vin, malsaĝe!
Ĉu tion vi per io tauga ŝmiras?“
„Li estas katideto nur!“ mi diras,
„kaj mia sango tre resaniĝemas.“
Sed, poste, en sekreto mi ekĝemas:
la amiketo el la kata gento
min vundis per senkulpa akcidento;
kelkaj amikoj min ektuŝis vunde,
malpli videble... multe pli profunde...

pana Amator-Radia Ligo, s-ro T. Kitabatake, sekretario de International Pen-Pal Club, s-ro M. Mizuhara, konata filatelisto kaj aliaj.

Ĉiuj tri Televidaj stacioj en Tokio plurfoje dissendis la scenojn de la kongreso. Krome Nihon Televi dissendis interparolon de s-ro K. Ossaka, kaj argentina samideanoj, d-ro J. Scolnic kaj lia fratino d-ro R. Scolnic, kiuj partoprenis la kongreson. NHK Televi (nekomerca) dissendis tutlande la scenojn



La Katido Dormas

Sen scivolemo kaj sen apetito,
sur la kanap' li rondas.
Nur la fluida flank' silente ondas;
sen li la brua, skua mondo mondas.
Li kaŝas la vizaĝon, ĉaras sian
propran mallumon, cirklon senpasian;
li estas io strange absoluta,
li estas surda, blinda, milde muta,
fermita cirkvito.

Hejmbesto

Vi dormas sur velur', aŭ lan', aŭ silko,
vi manĝas el telero; mi vin brosas;
vi ludas kun ŝnurpeco aŭ kun pilko,
kaj nokte mi la ĉambropordon ŝlosas.

Hejmbesto! sed en okulpar' fiera
mi vidas, ke vi ne obeas homon;
ĉe mi vi loĝas; restas vi libera,
tigreto, kiu ial havas domon.

Esperanto-literaturo reprezentata en Konferenco de Aziaj Verkistoj

La Konferenco de Aziaj Verkistoj okazis en New Delhi, Hindujo, inter la 23a kaj 28a de novembro 1956. Estante en tiu urbo, mi petis esti akceptita kiel „observanto flanke de la Esperanto-literaturo”, samkiel ĉeestis pluraj aliaj rekonitaj observantoj flanke de diversaj naciaj literaturoj.

Jam dum la solena inaŭguro mi havis la okazon fari paroladeton pri Esperanto kaj ĝia literaturo, antaŭ 500 verkistoj, delegitoj, observantoj kaj gastoj. Tiu mallonga informo tre bone impresis — laŭ diro de pluraj ĉeestantoj — ĉar antaŭ tio ni estis aŭditaj paroladojn en birma, vjetnama, ĉina, japana, urdua, nepala kaj aliaj aziaj lingvoj, plurajn el ili kun traduko al angla. La lingva haoso estis tro evidenta kaj plurfoje priparolata, tiel ke mi ne devis argumenti pri la neceso de internacia lingvo, kaj la eblecoj de Esperanto kiel pontlingvo por literaturoj kaj kiel lingvo de kongresoj internaciaj facile atingis la simpation de multaj delegitoj. Tamen, kompreneble, nenian konkretan proponon mi povis fari, kiel mi ankaŭ ne povis atendi ian adopton, aŭ eĉ rezolucion, ĉar la temaro de la Konferenco estis longe antaŭfiksita, kaj ĝi entenis ĉefe punktojn pri interŝanĝo de verkistoj el diversaj aziaj landoj, tradukadon reciproke, kaj la rilatojn inter verkistoj kaj eldonistoj. Krom la menciita paroladeto, miaj interparoloj kun multaj elstaraj verkistoj eble helpis iomete por plialtigi iliajn konon kaj respekton por nia lingvo.

Tie ĉi povus finiĝi la raporto, ĉar la tie traktitaj temoj ne interesas nin rekte. Tamen, estu al mi permesate komuniki du pensojn kiuj sekvas el nia reprezentiĝo en la citita Konferenco.

La unua estas, ke mi fakte ne rajtis reprezenti la Esperanto-literaturon, ĉar mi ne apartenas al ĝi. Mi fakte estas profesia verkisto, Miaj 11 libroj, kun meza paĝnombro de 200, estas eldonitaj kaj eldonataj en pluraj lingvoj, ĝis nun en 38 eldonoj. Sed en Esperanto ĝis nun estas eldonita nur unu noveleto, kiun mi mem eldonis. En kelkaj okazoj mi proponis al Esperanto-eldonistoj iun aŭ alian el miaj libroj, kiuj ĉefe estas pri miaj esplorvojaĝoj, bone ilustritaj, kaj ili donis al mi bonan nomon en pluraj landoj, samkiel la 1,700 prelegoj, kiujn oni aplaudis en 30 universitatoj kaj multaj aliaj klerigaj institucioj de Ameriko, Eŭropo kaj Azio. Eĉ se iu aŭ alia eldonisto momente entuziasmiĝis pri iu eldono, neniam ĝi konkretiĝis.

Plurfoje oni instigis min verki miajn librojn originale en la internacia lingvo, sed la stimulo venis de legantoj, ne de eldonistoj. Kion valoras verki en Esperanto — precipe por profesia verkisto — se oni ne eldonas ĝin? Mian lastan verketon — junularlibron pri aventuro en Amazono — mi verkis originale en serba kaj Esperanto. F-ino Marjorie Boulton afable tradukis ĝin el Esperanto al angla, kaj de tiu traduko estis farataj aliaj retradukoj, tiel ke ĝi estas nun samtempe eldonata en serba, slovena, angla, turka, hebrea (tradukita el E. de Itamar Even Zohar), hinda, bengala kaj marthia... sed ne en Esperanto.

Dum miaj intervjuoj kun edukaj aŭtoritatoj kaj aliaj intelektuloj, mi ofte prezentas min kun kelkaj el miaj bele eldonitaj libroj. Tio plialtigas la valoron de tio, kion mi diras pri E. Sed se oni hazarde min demandas, ĉu miaj libroj estas en E., mi troviĝas en granda embaraso. Tial, supozeble oni gardonos al mi mensogeton, kiam mi prezentas hispanajn kaj germanajn librojn, kaj al simila demando kapjesas.

Ofte mi pensis, ke eble mia verkmaniero ne taŭgas por la E-leganto. Tamen mi ricevis multajn gratulleterojn pro diversaj artikoloj, kaj ankaŭ post miaj prelegoj antaŭ samideanoj de multaj landoj, mi vidis ĝeneralan interesiĝon pri tiuspecaj libroj.

Bonvolu ne preni tion ĉi kiel personan lamentadon, sed eble kiel instigon por mediti pri miaj eldonejoj, eldonaj planoj, kaj pri tio, ke eble ne estus malbone ke la eldonistoj

iamaniere organiziĝu kaj pridiskutu la eldonindaĵojn kaj eble kreu iuspecan disciplinon en nia literaturo. Sendube mia kazo ne estas izola. Kaj se la eldonplanoj iamaniere garantius la eldonadon de bonaj verkoj de verkistoj konataj en siaj respektivaj literaturoj, tio certe instigus plurajn el ili verki originale en E.

La dua penso estas, ke tiu ĉi estis verŝajne la unua kazo, ke en internacia Konferenco la Esperanto-literaturo estis reprezentata, kaj traktata egalnivele kun ĉiuj aliaj. Kial ne fari el ĝi praktikon por la estonteco? Meze de marto ĉijara okazos en Parizo Internacia Konferenco de verkistoj. Ĉu la Esperanto-literaturo estos reprezentata en ĝi? Mi ne pensas, ke hazarde senokupa parizano nin reprezentu. Devus esti almenaŭ tri diversnaciaj, veraj verkistoj en nia reprezentantaro.

Sed por povi organizi tiajn reprezentadojn regule kaj sisteme, la E.-verkistoj devus organiziĝi en asocion. Kial ne? Eĉ la plej eta lando, kun literaturo malpli grava ol la nia, havas tiajn asociojn.


Laŭ privata informo, la organizantoj de la Pariza Konferenco estus pretaj favore konsideri petskribon pri reprezentado, se ĝi venus de iu oficiala organo (je manko de verkista asocio, de UEA), aŭ kun subskriboj de pluraj verkistoj esperantaj, rajtigante siajn reprezentantojn. Konvenus akompani la petskribon per tre mallonga informo pri la E.-literaturo.

Pri la granda utilo de tia regula reprezentado mi ne volas paroli, ĉar ĝi estas evidenta.

Hankow, Ĉinujo, januaro 1957.

Tibor Sekelj

(Ni estas certaj, ke la supra letero de s-ro Sekelj vekos grandan reĉhon ĉe la samideanoj. Rilate lian duan punkton, ni povas sciigi, laŭ lastaj informoj, ke la fonda de Verkista Asocio de esperantistoj estas jam nun vigle preparata; sed kompreneble tio ne povos okazi ĝustatempe por la nunmonate okazonta Pariza Konferenco. — Redakcio.)



„Mi vidas, Sinjoro Jakobo, ke la 8a 30 estas tro frua enirhoru por vi.”

Nia Progreso

Malnova pioniro povas pli bone konstati nian progreson ol juna esperantisto, kiu trovis multon jam preta. Mi uzas tiun maljunulrajton.

Ĉeestinte la solenan inaŭguron de LIBREJO ESPERANTO, en sia propra sidejo, la 15-an de Decembro 1956, kaj aliajn festojn de la Zamenhofa Semajno de 1956, mia penso retroiris al la unuaj tutlandaj kongresoj de Esperanto, por komparoj.

Mia matrikulo en Brazilia Esperanto-Ligo estas n-ro 13, kaj B.E.L. jam festas sian Oran Jubileon; sekve, mi estas malnova kunbatalanto por Esperanto kaj atenta observanto de nia progreso.

Ĉe la tutlandaj kongresoj de la unuaj jardekoj, neniu scipovis sufiĉe la lingvon por flua diskurso nek por interesa konversacio. La paroladoj aŭ estis tute en nacia lingvo, faritaj de invititaj neesperantistoj, aŭ legataj tradukadoj, tute malplaĉaj, kun la stilo de la nacia lingvo. Tiuj paroloj ordinare estis mallongaj salutoj komprenitaj nur de kelkaj kongresanoj. Neniu sciis parkere himnojn kaj poemojn, kaj nur kantis aŭ deklamis, tenante papereton en la manoj.

Nun oni habilas rapide kaj gaje. La oratoroj parolas improvize, bele, flue, korekte. Ĉarmaj poetoj deklamas kiel artistoj siajn poemojn. Ĉiuj kantas parkere belajn himnojn. S-ro Prezidanto de la Respubliko sendis sian saluton en nacia lingvo, sed la ceteraj telegramoj estas en bona Esperanto. Eble estas oficiala devo de la Prezidanto uzi la oficialan lingvon de la lando...

Kvankam nia lingvo estas tre facila, ĝi estas granda kulturlingvo kaj oni devas lerni tra la literaturo tutan amason da vortoj kaj esprimoj por korekte kaj flue paroli kaj skribi. Tian scion oni ne povas improvizi. Kiu ne multe legis, tiu



Parolas Iŝmael Gomes Braga. Dekstre staras la Prezidanto de la Kultura Kooperativo de Esperantistoj, D-ro Braz Cosenza.

balbutas malagrable, barbare, malbele.

Niaj lernolibroj estis propagandaj broŝuretoj, nur por montri la facilecon de la lingvo; nun ili dikiĝas: la kvina eldono de Esperanto sem Mestre (Esperanto sen Instruisto) havas 400 paĝojn dense kompostitajn, kaj ne tro insistas pri lingva facileco; ĝi montras ankaŭ lernendajn malfacilaĵojn.

De vidpunkto lingva ni do progresis, sed pli gravas, ke la movado ankaŭ fortikiĝas. En la Zamenhofa Festo de 1955 nia Kooperativo inaŭguris modernan presejon tute plenan por eldonado de libroj, revuoj, gazetoj, k.a. En 1956 la sama Kultura Kooperativo de Esperantistoj inaŭguris solene sian librejon en ĵus konstruita nubskrapaĵo, en la koro mem de la urbego, ĉe avenuo 13 de Maio 47. Tiun sidejon la esperantistoj aĉetis antaŭ tri jaroj, dum la konstruado, kaj jam finpagis ĝin. Antaŭ ili elstariĝis inteligenta kaj energia gvidanto, nome D-ro Braz Cosenza, kiun oni ne

konis antaŭ dek jaroj. La matrikulo n-o 1 de la kooperativanoj estas de lia ĉarma edzino kaj sekretariino. Kiel senkompatate, tra belaj ridetoj, ŝi kiel inteligenta kaj kuraĝa oratorino silentigas la pesimistojn! Mi tute ne dezirus havi ŝin inter miaj malamikoj, se mi havus malamikojn!

La 8-an de Decembro 1956 oni fondis la Brazilan Unuiĝon de Blindaj Esperantistoj (BUBE). Ni pasigis kelkajn horojn en la mondo de la blinduloj kaj tie kun miro renkontis eminentajn intelektulojn, kiuj estas denaske blindaj. Ili estas kleraj profesoroj, poetoj, muzikmajstroj k.a. Ĉefe nin ravis juna 16-jara muzikmajstro kaj genia poetino, kiu deklamis siajn majstroverkojn antaŭ ni. Unu el la celoj de BUBE



Parolas la gvidanto de la blindaj esperantistoj en Rio de Janeiro, Prof. Sylvio Pellico de Souza Machado.

estas eldonadi esperantajjn por blinduloj, tial oni fondis ankaŭ specialan kason por pagi tiajn librojn. Inter la blinduloj ankaŭ aperis eminentaj gvidantoj: Prof. Sylvio Pellico de Souza Machado, Luis Carlos d'Angelo k.a.

Dum 8 tagoj estis pluraj memorigaj solenaĵoj, kiel radio-programoj, kunsidoj, tutpaĝa intervjuo en granda tagjurnalo, vizito al Presejo Esperanto en plena funkciado k.a.; sed plej rimarkindaj estas la novaj organizaĵoj.

La 14-an en Belo Horizonte, oni fondis gravan asocion, sub la aŭspicioj kaj en la sidejo de la grava Spiritista Unuiĝo de Minas Gerais, kiu disponigis al niaj samideanoj du komfortajn ĉambrojn plene meblitajn por kunvenejoj kaj por kursoj. Tiu granda organizaĵo ĵus konstruis gigantan domegon en la centro de la ŝtata ĉefurbo. Tie funkcios la nova asocio.

De vidpunkto praktika por nia movado, la Zamenhofaj Semajnoj de 1955 kaj 1956 estas senkompare pli gravaj ol niaj tutlandaj kongresoj, kies alta kosto ordinare restas tute senfrukta por Esperanto. Dum la Zamenhofaj Semajnoj oni eldonis novajn librojn, funkciigis maŝinojn, kreis novajn asociojn, fondis propagandan kason, inaŭguris librejon. La esperantistoj agis samtempe en diversaj urboj per celkonscia laboro.

I. G. B.

**HELPU ANKAŬ VI LA PROGRESON
DE ESPERANTO**

per varbado de

APOGANTOJ DE UEA!

**Mendu jam hodiaŭ libreton
de Atestiloj!**

Lingvo kaj kulturo

La celo de Esperanto estas interfratigi la homojn pere de pli bona interkompreniĝo morala kaj kultura. En registrita prelego ĵus aperinta, D-ro Lapenna tre prave diris, ke lingvo estas socia fenomeno kaj ke „la kultura valoro de kiu ajn lingvo dependas ekskluzive de la kulturaj valoroj kreitaj en ĝi”. Signalado por aviadiloj aŭ regularo por fervojoj eĉ en Esperanto ne havas multan kulturalan valoron.

Sed eble, oni ne vidas ĝuste kion oni komprenu sub la vorto: kulturo. Kiam oni parolas pri la kulturo de unu popolo, de unu lando, oni esprimas la sumon de la penoj, de la laboroj intelektaj en la dirita popolo por suprenlevi sin el la kruda vivo ĝis la rafinitaj formoj de socioj, ĝis la delikatecoj de la artoj, ĝis la profundeco de la scienca analizo kaj rezonado. La kulturo ne estas privilegio de „supera klaso” kiel oni kelkfoje kredis. Se la scienca kulturo estas praktike universala, en la aliaj branĉoj de la kulturo ekzistas multaj naciaj kulturoj, ĉar dum la daŭro de la tempoj la civilizacioj evoluis ne same en diversaj regionoj de la Mondo, la moroj, la artoj, la konceptoj interne disvolviĝis en ĉiuj landoj.

Ĉu, krom la scienca kulturo jam internacia, povas ekzisti internacia formo de la kulturoj? Formo senigita el la landaj devenoj? Mi pensas jese. Same kiel la internacia lingvo trovis siajn fontojn en la naciaj lingvoj, la internacia kulturo devenas el la naciaj kulturoj. Formoj de la naciaj kulturoj estas ofte malbone konataj de unu lando al la alia, eĉ ignoritaj de unu parto de la Mondo al la alia. Ekzemple se Eŭropaj kulturoj iris al Afriko aŭ Aziaj landoj, kvankam supraj sed sufiĉe vaste, male la Eŭropanoj ofte scias nenion pri Aziaj kulturaj formoj.

La venonta etapo estas verŝajne la ĝenerale akceptita koncepto de Monda

Kio estas la Literatura Kaso?

La Kongreso en Kopenhago vidis la naskiĝon de nova Kaso. Ne temas pri nova maniero por instigi la donacemulojn subteni la disvastigon de Esperanto, nek pri speciala fondaĵo por helpi al tiu aŭ tiu alia kampanjo. La Literatura Kaso celis plifortigi Esperanton mem en ĝiaj fundamentaj bazoj, en ĝia esenco kiel lingvo.

Ĉiuj scias, ke la triumfo de Esperanto estas tre strikte ligita al la evoluo de ĝia literaturo. La rolo de la Internacia Lingvo en la mondo kreskos proporcie al la nombro kaj kvalito de la intelektaj produktoj en ĝi aperintaj. En nia ĉiutaga informado ni varme provas la vivecon de Esperanto per citado de ĝia verkaro, originala kaj tradukita, per montrado de ĝiaj libroj. Ni mirigas niajn aŭskultantojn antaŭ nia biblioteko kaj ni ofte ne konscias, ke en tiu kreado grave kontribuis specialigita institucio: la Belartaj

Kulturo kiun mi provos difini jene: La emo kompreni ĉion povantan suprenlevi la homan kondiĉon, ami ĉion certigantan la harmonian ekzistadon de la homoj. Ni memoru pri tio faman diron de la granda beletristo Victor Hugo: „El ĉio oni laciĝas krom el komprenemo”. Tio estu nia devizo en nia kultura lernado internacia. Ni diru ankaŭ ke kulturaj internaciaj interŝanĝoj estas la fonto de progreso de la lingvo Esperanto. Nur per ili oni interesigos pli kaj pli da homoj al nia celo, nur per ili oni donos al la lingvo la tutan pliriĉigon kiun ĝi ankoraŭ bezonas.

Tial, estas tre bone, se okazas ĉiujare almenaŭ unu internacia studkunveno kun kleruloj jam uzantaj la internacian lingvon kiuj venas prelegi kaj diskuti pri kulturaj problemoj. La celo de tiaj kunvenoj ne estas la sama je tiu de la Universala Kongreso nek de la Somera Universitato. La I.S.U. ebligas fari kiel eble plej imponajn demonstraciojn publikajn de Popola Universitato antaŭ grandaj internaciaj ĉeestantaroj. Male, kulturaj internaciaj restadoj estas kvazaŭ seminarioj de homoj kiuj poste uzos la internacian lingvon por kulturaj celoj. Samideanoj speciale interesitaj pri tiu ideo estas invitatitaj partopreni al la restado kiu okazos en Francujo sur la modelo de tiu kiu okazis lastjare en Frostavallen (Svedujo).

Ie, mezokcidente en Francujo, situas bela kamparo kie la kulturkampoj alternas kun arbaroj kaj pitoreskaj valetoj. Antaŭ kvin jaroj aro da francaj samideanoj starigis kooperativon por aĉetado kaj zorgado de bieno en kiu ili fondis la Esperantistan Kulturdomon. Tial la kastelo Grésillon estas la konstanta centro kie kunvenas samideanoj dezirantaj studi temojn aŭ aranĝi specialajn kursojn. Ĝi tute taŭgas por la ĉi jara kultura studtempo internacia. Sub la Aŭspicioj de U.E.A. kaj dank' al la kuraĝigoj de ĝia Ĝenerala Sekretario

Konkursoj. Tiuj konkursoj, similaj al la jam ekzistantaj en ĉiuj landoj pri ĉiuj lingvoj, ĝis nun revelaciis dekojn da elstaraj verkoj en prozo, poezio kaj teatro. Multaj eminentaj Esperanto-verkistoj debutis en la Belartaj Konkursoj, aliaj konfirmis sian valoron. Nomoj kiaj P. Thorsen, M. Boulton, E. Dondi, E. Urbanova, Musella estas la honorplena flago de niaj literaturaj konkursoj.

La Literatura Kaso ĝuste celas doni al la Belartaj Konkursoj la rimedojn por digne funkcii kaj por ampleksi ĝi la laboron. Por protekti la esperantistojn kontraŭ la svarmado de donacaj kasoj, la Kongreso en Kopenhago nuligis la antaŭe ekzistantan Kongresan Kason. Al ni esperantistoj, kongresanoj kaj ne-kongresanoj, restas la devo malavare montri nian solidarecon al la Literatura Kaso. Dum la Universala Kongreso en Marseille okazos nova sesio de la Belartaj Konkursoj: kontribuu al ilia sukceso.

Donacu al la Literatura Kaso!

G. C. Fighiera.

D-ro Lapenna okazos dektaga studrestado kies programon ni donas ĉi tie: *Kulturaj Internaciaj Fervoj* Kastelo Grésillon-Baugé-M & L, Francujo. 15an—14an julio 1957.

A) Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo-Rolo de UNESKO por Interkonigo de Kulturoj.

Mag. William Auld (Glasgovo): Toynbee kaj la vivo de la Civilizacioj (Tri prelegoj).

Prof. D-ro I. Lapenna (Londono): La laboro de UNESKO por Interkonigo de Kulturoj (Tri prelegoj).

Prof. G. Waringhien (Parizo): La Evoluo de la Loire Civilizacio (Tri prelegoj kaj gvidata vizito al Kasteloj de Loire).

D-ro A. Albault (Toulouse): Populaciaj problemoj kaj ilia rilato al la Kultura vivo de la Popoloj (Tri prelegoj).

Inĝ. R. Watier (Parizo): De la XVI-jarcento ĝis la aŭtomatigita Socio (Tri prelegoj kun filmoj).

Debatoj kun la ĉeftemo: Rilato inter Kulturo kaj Civilizacio (partoprenas ĉiuj prelegantoj).

B) Problemoj de la Esperanto-Movado:

Prof. D-ro I. Lapenna:

1. Kiel organizi la informan laboron?
2. CED kaj ĝia rolo.
3. Kunveno de ĉiuj ĉeestantaj kunlaborantoj de C.E.D.

D-ro A. Albault: La ĉefaj kulturaj problemoj de la Esperantaj Societoj (prelego kaj diskuto).

Mag. W. Auld: La nuntempa Esperanta literaturo (kun Ekspozicio de libroj kaj diskuto).

Inĝ. R. Watier: La kreado kaj vivo de Esperantaj societoj kaj la instruado de Esperanto (prelego kaj diskuto).

Prof. G. Waringhien: Memorajoj pri lingvaj diskutoj.

S-ro Micard, Prezidanto de la Kulturdomo: Kreado kaj vivo de la Kulturdomo.

El tiuj prelegoj kaj debatoj devos rezultiti konkludoj kaj eble oni povos pretigi dezirojn rilatantajn al kultura nivelo de la Movado kiuj estos prezentitaj al la U.K. en Marseille.

Ni devas nepre aldoni, ke tiu serioza studado ne estos enua aŭ rigide lerneja. Se la vetero estos bela, kiel oni rajtas esperi dum julio la debatoj okazos subĉiele en la parko. La programo estas aranĝita por alterni la prelegojn kaj debatojn kaj ankaŭ posttagmeze okazos ekskursetoj al najbaraj kasteloj. Oni preparas du grandajn ekskursojn: unu dumnokte al prilumitaj kasteloj kaj ĝardenoj en Loire-valo, alia tuttaga Dimanĉon 21an de julio al plej famaj kasteloj: Amboise, Blois, Chambord.

Fine, la vesperoj en Grésillon estos aktivaj: per muziko, danco kaj artaj prezentadoj, kino k.t.p. . . oni daŭrigos la kulturalan etoson.

R. Watier

Noto: Ĉiujn informojn pri la restado oni komunikos per speciala presajo. Petu ĝin de Prezidanto de la Kulturdomo — Kastelo Grésillon, Baugé M & L, Francujo.

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

LA INFANA RASO. Poemo en 25 ĉapitroj de William Auld. Kun antaŭparolo de John Francis kaj ilustraĵoj de Pierre Lavalle. Eld. J. Regulo. La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1956. 108 p. 16 x 22.5 Prezo: 1.80 usonaj dolaroj, aŭ egalvaloro, plus sendkostoj.

En sia antaŭparolo al la poemaro de Marjorie Boulton, „Kontralte”, la aŭtoro de „La Infana Raso”, William Auld, skribis ĉi tiujn aŭgurajn vortojn: „Por atingi la parnasosupron, oni devas verki poemojn iom longajn, trakti profundajn kaj malfacilajn temojn kaj problemojn, kiuj ne solviĝas per manpleno da versoj...” Tio estis en junio 1954. En fino de januaro, jaron poste, „La Infana Raso” estis finverkita.

La liriko de Esperanto estas hodiaŭ tute sana. Ni povas fieri pri lirikistoj dediĉitaj kaj eĉ inspiritaj. Sed nura liriko ne produktas la majstro-poetojn. Por tio necesas konkero de la du pintoj de eposo kaj dramo. Tion konsciis la genio de nia Auld. Per sia kuraĝa kaj unika verko li levis la Esperantan vorton en alton ĝis nun neniam atingitan de iu Esperanta poeto. Fine kreiĝis la majstro-verko, kiu montras al la mondo Esperanton kaj ties popolon.

Jam de kelkaj jaroj W. Auld oferis sian „masivan talenton” (laŭ esprimo de M. Boulton) al la Esperanta poezio originala kaj traduka. De la sensacia poemaro „Kvaropo” (1952) li sola okupis duonon, kaj estis unuanime laŭdata de recenzistoj kiel geniulo. Por la preparata Angla Antologio, kies poezia redaktoro li estas, li mem tradukis pliparton de la poezia parto. Samtempe li redaktas Antologion de Originala Poezio de Esperanto, aperonta en 1957. Li ankaŭ servadas la Esperantistaron kiel redaktoro de la organo de UEA kaj kunlaboranto de CED. Kune kun ĉio ĉi li devis daŭrigi siajn studojn ĉe la Universitato en Glasgovo, kiujn li tamen ĵus feliĉe finis akirinte MA-diplomon. Kaj familion li ankaŭ devas vivteni! Ĉiuj povas ja facile konjekti, ke ne nur ekstrema energio estas necesa por tia aferosumo, sed antaŭ ĉio spirito de transcenda seriozo kaj celkonscio.

LIR estas intelekta verko kun sentovibra subfluo. Kosmokonscia animo tie strebas analizi homvivan kaoson, prilumi obskurajn enigmojn per revelaciaj ekbriloj, pripalpante por firmaj bazoj. Tia pripalpo renversas ĉiajn homfaritajn

idolojn kaj dogmojn, virgigas terenon por kultivo de la aŭtora kredo pri pli-perfektegebla homaro. Ĉar disemite tra la verko ehas la gravega konstato, ke la ŝlosiloj de ĉiuj institucioj de la civilizo „estas troveblaj antaŭ Sargono Unua”, pri kies kronologia stadio ni informiĝas en ĉap. IX. Tiujn ŝlosilojn ni devas anstataŭigi per IO NOVA (ĉap. XXI), por ke la sama afero, „la même chose”, ne ripetiĝu. Forviŝo de malnovaj kliŝoj, silentigo de falsaj sofismoj, ruinigo de ŝajnaj valoroj devas antaŭi la rekonstruon. La Sargon-motivo, la fantomo de ripetataj eraroj, servas kiel lumtura averto tra la verko, ĝin pretervidi kondukas al perejo.

La infana raso: ĝisnuna homaro. De l'eko ĝis nuno: sekundopaso. Vi kaj mi: beba spireto. Tia estas la homara koncepto de Auld. Relativa tamen, ĉar la fono kulpas. Tempo kaj spaco: ĉu malamikoj niaj? La konceptoj gustumas de frustrado, la menso spasmas kvazaŭ gorĝo pro galo. Kuraĝa vi kiu defias! Kiu volas sekci la misterojn! La kosman koron!

Auld suferas de kosma nostalgio. Ĝi tamen ne sinonimas fuĝemon for de la turmentita Tero, sed brakumpreton de la poeto por ĉia vivo ĉie; por li la Tero nur egalas polveron en la senfina spaco, kie ŝvebas sennombraj sunoj kaj planedoj, kiuj plej certe maskis vivon, fremdan aŭ similan al la Tera. Li tamen ne ŝajnas vidi iun supersaĝan racion post la kosma meĥanismo: la homa vivo nur estas fraĵo de kosma akcidento, kiu egale kredeble povus okazi kie ajn. Sen la korpo la animo ne ekzistas:

*„L'animo estas pens' kaj emocio;
cerbo kaj glandoj. Sen la korp' nenio.
La raso estas juna: ĝi konstruos
teran ĉielon — post la mort' de Dio.”*

ĉar malgraŭ ĉiuj duboj kaj pesimismaj tendencoj la poeto-filozofa kredas al la Homo kaj la Evoluo.

„Diversaj homoj reagos diversmaniere al La Infana Raso” saĝe skribas John Francis en sia bonega antaŭparolo al la verko. Tre certe, ĉar tiel malkonvenca verko kiel LIR similas malaltan atmosferan premon: invitas la ventojn. Ne nur la poeto mem respondas la defion: la lingvo samkulpas! Ĉar neniu nacia lingvo, tradicie katenita, ebligas al uzanto sin tiel simple, rekte kaj senafekte esprimi. La aŭtoro certe opinias, ke per la pureco de Esperanto la homaro povus

atingi puran moralon kaj pli puran vivmanieron. Per senindulgaj vortotromboj li spitas la akceptitan kodon de deco kaj prudo, atakas la hipokriton kaj fariseismon de la mondo kaj celas starigi homdignan bazon en formo de la racio. La homan eraremon li tamen forte konscias, kiel ĉi vortoj bele atestas:

*„Pri via propra pravo neniam estu certa,
sed aliulo estas, samkiel vi, mallerta.”*

Pli ol ĉion Auld amas la homojn. Ĉu iam iu poeto tiel konscie kaj elvokive esprimis sian samsangecon kun la tuta homaro pasinta kaj estanta kiel la aŭtoro de „La Infana Raso”?

*„Saluton, frato, kiu kolportas sur la
stratoj —
nin ia malproksima orgasmo faris fratoj!
Kaj vi, juĝist' severa — saluton do,
amiko!
Nin ambaŭ kreis iam la sama
ingvenotiko!”*

Mi dubas. Ĉar dum aliaj aferoj egalas, Esperantista poeto pli profunde sentas sian homaran apartenon. Vizia poeto kiel Auld penetras sian devenon ĝis „prapraa duĝo de ameb”, sian ĝeneron vidas nur kiel eron de ĉeno „kies finon ne formas ni nek vidos.” Tio donas al lia verko gravegan valoron: tiun de ĉiupersona kunhomeco, kiu levas la poemon ĝis ekstrema alvokivo, ĉar ĉi tie trovas komunajn esencojn de homa vivo kaj ties rilatoj al la universo.

„La Infana Raso” estas epizoda epopeo. Ĝi ne rakontas, ĝi reliefigas, kompaktigas. Tio plivalorigas la libron por samideanoj, sed tre probable fortimigas ŝaŭmideanojn. Ĉar oni devas streĉi la cerbon. Kaj neniu plene ĝuas la libron sen antaŭe sin liberigi el la katenoj de la konvencio kaj estas preta serĉi kun sincera animo. Aludoj al certaj aferoj, ekz. el la historio de Esperanto, necesigas antaŭkonon por plena kompreno. Ŝajnas, ke pli da prialudaj klarigoj devus kompletigi la liston de klarigoj, ekz. de la vortoj SAL BER JON ROŜ, kiuj aperas en ĉap. XII kaj ehas kaj reeĥas en postaj ĉapitroj. Tamen estas vere, ke tiuj vortoj, kiuj estas laŭ la lingva teorio de Marr la unuaj kvar pravortoj de la homa parolo, ne estas tiel esoteraj kiel unuavide ŝajnas, ĉar la esperantistaro jam dufoje havis okazon ekkoni ilin: en Retoriko, p. 22 kaj en Revolucio en la Lingvoscienco (de Andreev), p. 23. Oni do povas diri, ke la poeto „ludas laŭ la reguloj” uzante ilin.

Multegaj vortludoj kaj kaŝesprimoj konsiderinde eĉigas la libron. La aŭtoro ankaŭ pravigas ilian uzadon dirante ke „lingvo sen vortludoj mortnaskiĝus.” Tuta ĉapitro (la IV.) estas subtenata de tre trafaj vortludoj kaj vortkripligoj por krei apartan etoson:

*„Laŭ gonoraloj, la milit' necesas —
nu, kunpremeble, ĉar per ĝi inspezas
tiaj fraponoj, kaj hakiras gloron...”*

En tempo, kiam senskrupulaj politikistoj kaj militprovokaj kanajloj ŝovelas polvon sur lacajn okulojn de pacopiranta homaro tia ekstreme originala pre-

zento de la ege aktuala temo, probable nur ebla en Esperanto, kvazaŭ rekreacia nian konscion.

„Diversaj homoj reagos...”, — jes, jes, kaj komplekse. Mia propra reago tamen ne estas tiom kunmetita, ĉar ĉiuj pensfluoj de la poeto ŝajnas al mi kunigi ĉe sama enfluejo: supersentema seriozo pri la estonto de la homaro, modifita de la malhelaj koloroj de homa soleco en senfina kosmo:

„Ho kara mia
jen povra testamento;
jen mia kredo
espero kaj turmento:
mi kredas pri la
bonvolo de l'homaro,
ke iam pasos
kruelo kaj amaro,
ke iam venos
la regno de l'racio;
sed multaj larmoj
necesos antaŭ tio.”

Legantoj, atentu tian testamenton!

La aspekto de la libro estas tre plaĉa kaj presado bonega. Interesaj dekoracioj de la pentristo Pierre Lavalle (vd. „Esperanto”, 1956, p. 149) liveras simblan atmosferon al la poemo. La eldonejo „Stafeto” kaj ties entreprenisto, J. Régulo Pérez, kiu montras per sia laboro pli ol nur homan kuraĝon, meritas ĉian laŭdon kaj dankemon de la tutmonda Esperantistaro pro la aperigo de ĉi tiu epokfara verko. Epokfara, ĉar W. Auld per ĝi donas al la Esperantistaj poetoj novan ŝlosilon: tiun de la kuraĝo entrepreni pli grandajn kaj fortostreĉajn verkojn ol la ĝisnunajn.

Baldur Ragnarsson.

TEATRO EN SOCIETO. Redaktis Emilija Lapenna. Eld. Kroatia Esperanto-Servo, Zagreb, 1956. 84 p. 11 x 16. Prezo 120 dinaroj aŭ 0.50 dolaroj.

Drametoj trege valoras en la grupa vivo, en instruado kaj ankaŭ por privata legado: ili instigas gelnantojn paroli, helpas al bonaj paroladkutimoj, allogas per amuzo, helpas la memoron pri la kutimaj frazoj de nia lingvo. S-ino Emilija Lapenna, helpita de Mirko Mamuzić kaj la mistera Shertse Mulo, faris tre valoran laboron, disponigante al la Movado tutan stokon da 12 drametoj kaj skeĉoj. Ni bezonas multajn similajn verkojn.

Neniu ajn inter tiuj ĉi drametoj estas literature pretendema aŭ profunda; la plimulto estas nur farsetoj tre mallongaj pri unu simpla ideo. Sed la lingvo estas bona; la roloj estas direblaj; kaj oni ne bezonas scenejon aŭ aliajn specialajn aĵojn, kaj ĉiuj drametoj estas bonaj laŭ la propra, celita nivelo. Multaj grupoj povus profiti per la libreto, precipe por stimuli inteligentajn iom-post-komencantojn.

Bedaŭrinde la presisto ne kompetentis same kiel la verkistoj; la interpunkcio bezonis pli da atento, kaj preseraroj estas iom oftaj. Tamen, la libreto ja valoras la prezon.

Marjorie Boulton.

Kumbel: GRUK. Tradukita de Poul Thorsen. Eldonis Libroservo de Centra Dana Esperantista Ligo 1956, 1000 ekzempleroj, 72 paĝoj, broŝurita. Prezo 3.50 sv.kr.

Brilanta ĉarmo de miniaturaj majstroverkoj de fajna cizelaĵo respegulantaj en miloj da variaj facetoj la mondon ĉirkaŭe pulsantan el juvelista varfenestro — jen kolekto de grukoj de Kumbel. Kvazaŭ vi estus manplenon de tiuj ravaj juveletoj preninta kaj kaŝinta en via taŝo*), tiel vi sidas kun ĝoja koro super la libreto, kies ĉiu paĝo estas aparta trezoreto.

Kumbel estas pseŭdonimo de dana poeto kaj karikaturo Piet Hein, kiu kun filozofa saĝo, sprita rimarkivo kaj optimista humuro observas nian tempon, nian mondon kaj vivon. La rezulto de lia ekkono doniĝas al ni en liaj grukoj. Tiel li mem nomis la epigramecajn aforismojn, da kiuj li aperigis en la granda dana ĵurnalo Politiken preskaŭ 5000. Ĉiu el la serioze-humuraj kelkversaj rimajoj estas kompletigata de unike trafa karikaturo de la ideesenco aŭ artisma penskoncentraĵo, kio verdire la spritaj grukoj estas. Kaj kiel ilustranto Kumbel estas same trafe inventema kaj malbanala. Li senvizaĝe akompanas nin kun sia liro preskaŭ sur ĉiuj bildetoj — ĉar Kumbel estas ankaŭ la nomo de tiu vigla kaj ŝvebrea poefiguro, kaj ne malpli ol en la versoj li tie montriĝas unika talento.

Gruko, poeziaĵo plus karikaturo, donas al ni maksimumon per minimumo da vortoj kaj strekoj kaj formas unu ne-dividendan tuton. Tial ĉi-sekvaj senbildaj versoj donu nur duonan imagon pri la sprita ĉarmo de la verketo:

INTROSPEKTO

Ne ekzistas hom' kun pli da
introspekta mematenito
ol person' serĉanta ion
per la lang' en trua dento.

MASKOBALO

(Song-gruko en la fasta tempo)
Mi sonĝis en la temp' de karnaval'
pri brila eksmoda maskobal'
kun granda publiko maskita.
Sen masko venis la vero nur.
kaj ĉiuj post unu rigardo sur
la trajtoj deklaris: „Ho, kia plezur!”
Jen venas mensog' kamuflita.”

LUN-IRO

(Aŭ kiujn sendi tien?)
Nokta etoso en spacvetura tempo.)
Jen pendas Luno: plen-oranĝo,
senŝela, preta por ekmanĝo.
Sed kostas iro kaj reveno
la propran pezon en plateno.
Apenaŭ tiom emas multaj
malŝpari por plezuroj stultaj.
Sed ni komune ŝparus ĝoje
por certaj uloj — unuvoje.

NI MONDCENTROJ (Gruko filozofia)

Mi estas l'Universa mezo —
logiko tion ne kontraŭas.

Subtenas al la hipotezo,
ke la cetero min ĉirkaŭas.

Jam laŭ tiuj kvar gustoprovoj el la 70-peca regalo oni vidas kiel majstre kaj artfakule liberiĝis de la malfacila tasko la tradukinto Poul Thorsen. Li, kiu apartenas al nia poetara elito, scipovis redoni la belon kaj penskompakton de la originaloj surprize perfekte. Ĉar estas nenfo pli malfacila ol tradukadi ĉi tiajn sigle kurtajn ideodensaĵojn en poetike perfekta kaj adekvata formo. Kaj tion plej altgrade atingas Thorsen per sia esprimriĉa kaj modela lingvo kaj poezia arto. Eĉ kun plej pedanta kritikemo oni trovas eble 2 aŭ 4 versojn, kie estus atingeblaj rimoj pli trafaj aŭ pli bona ritmo. Tio estas granda komplimento al la interpretito kaj al Esperanto.

Pro sia ekstera aspekto, belgusta grafika aranĝo, bonega papero, absolute senpreserara teksto impresas la verko kiel bibliofila eldonajo kaj plezurigos plej altgrade ĉiun libro- kaj artamanton.

Jiri Kortnek

*) taŝo — (sinjorina) mansaketo.

SUSPEKTINDA PERSONO de Branslav Nušić. Trad. Antonije Sekelj. Eld. Serbia Esperanto-Ligo, Beograd, 1956. 56 p. 12 x 17. Prezo 90 dinaroj.

Jen verva, agoplena, tre amuza komedio kiun amatoroj povus bone ludi, kiu ne bezonas komplikajn scenaranĝojn aŭ ilojn kaj kies Esperanta stilo estas simpla, viva kaj korekta. Tial la libreto estas forte rekomendinda kiel legmateriale por grupoj, kaj mi esperas ke multaj ekster Jugoslavujo aĉetos ĝin. La papero estas malbela, pluraj preseraroj troviĝas, sed komense la prezo estas tre malalta kaj la presado estas klara.

La komedio enhavas farsajn ecojn; ekzemple, diversaj katastrofoj okazas al diversaj postajoj, oni frakasas vazojn kaj oni pli ol unufoje komencas jeti aĵojn al aliaj rolantoj. Sed ĝi ankaŭ enhavas multajn amuzajn parolturnojn, multajn trafajn aŭ bele maltrafajn respondojn, kaj intrigon vere tre lerte plektitan. Ĝi iom pensigas min pri *La Revizoro*, havante preskaŭ la saman medion de loka administrado, nek tre kompetenta nek tre senkorupta! Mi kredas ke ĝi ridigos preskaŭ iun ajn Esperantiston, ofendos neniun ajn kaj estos tre utila libreto.

Mi tamen dankus al s-ro Sekelj eĉ pli se li estus doninta kelkajn informojn pri la aŭtoro; unu el la valoraj servoj de Esperanto estas ke ĝi konatigas al la mondo bonajn verkistojn de malgrandaj landoj kiujn oni emas malsufiĉe atenti; kaj kelkaj ŝajne juraj fakvortoj kiuj ne troviĝas en PV kaj S bezonas glosion — se ili ne estas nur parodiaj vortoj de kolera troigulo — sed, se jes, oni klarigu tion.

Sed multan dankon, kompetenta tradukinto: vi donis al mi grandan sanigan ridadon, kaj mi kredas ke via laboro saniga ridigos multajn gesamideanojn.

Marjorie Boulton.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957
Stato je la 31-a de januaro 1957

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	1815	90,03
2.	Nederlando	4894	3805	77,75
3.	Danlando	1910	1400	73,30
4.	Svislando	1910	1380	72,25
5.	Svedujo	6895	4450	64,54
6.	Hispanujo	2092	1305	62,38
7.	Britujo	7351	4556	61,20
8.	Francujo	6575	3837	58,36
9.	Belgujo	1952	1034	52,98
10.	Brazilo	6985	3636	52,05
11.	Italujo	3620	1865	51,52
12.	Norvegujo	2113	890	42,12
13.	Finnlando	2687	1105	41,12
14.	Germanujo	6515	2185	33,54
15.	Jugoslavio	3563	610	17,12

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Portugalujo	580	470	81,03

2.	Izraelo	290	200	68,96
3.	Kanado	500	320	64,—
4.	Sudafriko	230	125	54,35
5.	Aŭstralio	1025	495	48,29
6.	Urugvajo	325	150	46,15
7.	Japanujo	1210	435	35,95
8.	Novzelando	942	265	23,18
9.	Maroko	1061	265	24,98
10.	Islando	405	20	4,94
11.	Aŭstrujo	1000	10	1,—

Jen niaj novaj konkursoj. Same kiel en la antaŭa jaro, validas kiel kvoto la nombro da poentoj akiritaj en la fino de la antaŭa konkurso. Ne estas alkalkulitaj la poentoj por membroj 1956 registritaj en la C.O. ankoraŭ post 31-12-1956 (ja ekzistas ĉiam tiaj prokrastemuloj!). En 1957 ni aljuĝos por J—MJ kaj J—MA saman kvanton da poentoj kiel por MJ kaj MA, ĉar varbi ilin estas egale grave por la Asocio. Kiel antaŭe, la aljuĝo de poentoj okazos jene: por ĉiu AM: 1 p., por MJ 5 p., por MA 10 p., por MS 15 p., por Patrono 50 p., por Nova Dumviva Membro 50 p. Varbu, varbadu kaj venku!

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 291

La 1-an de februaro 1957.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de januaro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de januaro 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	1519	3498
Individuaj membroj		
MJ	456	405
MA	2421	2833
MS	468	448
Pat.	8	4
DM	299	296
HM	58	52
JMJ	—	3
JMA	—	30
	<u>3710</u>	<u>4071</u>
	5229	7569

DELEGITOJ

Aŭstralio
Perth D.: Vakas.

Aŭstrujo
Innsbruck (Tirolo) D.: Vakas.
FD (Policaj Aferoj): Vakas.

Brazilo
Feira de Santana (Bahia) D.: s-ro Benedito Figueiredo Farias, instruisto de desegno, Rua Cons. Franco 142.
Macaé (Estado do Rio de Janeiro) D.: s-ro Sylvio Roberto dos Reis Peixoto, kontisto kaj instruisto, Rua Demétrio Fragoso 47.
Votuporanga (Estado de Sao Paulo) D.: s-ro Benedicto Silva, instruisto, Rua Pernambuco 1102.

FD (Latina kaj Romanidaj lingvoj): La D.
FD (Librotelistaj aferoj): s-ro Joaquim Alves de Figueiredo, librotelista, Rua Paraná 485, Caixa Postal 38.

Britujo

Crawley (Sussex) D.: Vakas.
London FD (P.T.T.): Vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Karlovy Vary (Ĉeĥy) D.: s-ro Vladislav Horák, ĉefkuiristo, Stalingradská 37.
Kolin (Ĉeĥy) D.: s-ro Jan Janda, oficisto, Dobrovského 275, Kolin III.
Martin (Slovensko) VD: inĝ. Stefan Vesely, redaktoro, Hviezdoslavova 2.
Mérin (Morava) D.: s-ro Rostislav Po-

deprel, oficisto, okres Velké Meziříčí, Mérin 224.

Olomouc (Morava) D.: prof. Miloš Rudolf, referanto profesoro, Wanklova ul. 14.

FD (arĥeologio): La D.

Pisek (Ĉeĥy) FD (Turismo): s-ro Libor Krivánek, oficisto, Zborovská 1332.

Trinec (Slezsko) FD (Turismo): Anna Milatová, oficistino, Husova 304.

Úsilné (Ĉeĥy) D.: s-ro František Nymburský, oficisto (teknika), Úsilné č. 35 pp. Hrdějovice ĉe Č. Budějovice.

Znojmo (Morava) D.: Miloš Hruška, oficisto, Znojmo, Bezručova 4, ĈSR.

Francujo

Angoulême (Charente) D.: s-ro Louis Jonquet, oficisto (sociaj asekuroj), 42 rue de Bassau.

Migennes (Yonne) D.: Pastro Jean-Marie Hufschmitt, 54 rue Emile Zola.

Pfastatt (Haut-Rhin) D.: s-ino Hélène Lerdung, dommastrino, 3, rue des Samaritains.

Rennes (Ille-et-Vilaine) D.: s-ro Robert Martin, profesoro, 1, Boulevard Laënnec.

Rouffignac (Dordogne) D.: s-ro Jean-Roger Léger, emerita Lto-kolonelo.

Rubercy (Normandio) D.: F-ino Eugénie Chérie, instruistino, Rubercy par Bernesq.

Saint-Pierre-des-Corps (Indre-et-Loire) D.: s-ro André Aude, fervojisto, 64 rue Pierre Curie.

Thiers (Puy-de-Dôme) VD: Vakas.

Tréteau (Allier) D.: s-ro Gabriel Musnier, instruisto.

Tulle (Correze) D.: s-ro Robert Schoonenbergh, policinspektoro, 37, avenue de la Bastille.

Germanujo

Hannover (Niedersachsen) D.: s-ro Heinrich Müller, faklerneja superinstruisto, Mommsenstrasse 5/1, Hannover-S.

FD (Komerco): Vakas.

Ludwigshafen a. Rh. (Rheinland-Pfalz) D.: s-ro Heinrich Kuhn, kuproforĝisto, Raschigstrasse 77.

Hispanujo

Jerez de la Frontera (Cadiz) D.: s-ro Pedro Naranjo Teran, industriisto, Negros 5.

Lugo (Galicio) D.: s-ro Fernández Méndez Fernando, advokato, Santo Domingo 12, 2°.

FD (Juro): La D.

San Mateo (Ybiza-Baleares) D.: s-ro Antonio Costa Bonet, paroĥestro, Casa Parroquial.

Italujo

Genova D.: s-ro Giancarlo Sartorio, oficisto pri statistiko, Via Germano Jori, 24/4.

Nederlando

Den Haag (Z.H.) D.: Vakas.

FD (Filatelo): Vakas.

Haarlem (N.H.) FD (Instruado): f-ino Cath. M. Burger, prof-ino de franca lingvo, Verspronckweg 92.

Nieuw Scheemda (Groningen) D.: s-ro Koert Hendrik Sportel, lernejestro.

Rotterdam (Z.H.) FD (Tekniko): s-ro Joaquim Calado, maŝindeseĝnisto, Vergeet-mij-niet-straat 29b.

Woudrichem (N.Br.) FD (Instruado): s-ro Dirk Prins, lernejestro, Hoogstraat 64.

Pollando

Warszawa FD (Arkitekturo): s-ro Kazimierz Tyimiński, arkitekturisto, str. Górnoślaska 45-24.

Złotoryja (woj. wroclawskie) D.: s-ro Leszek Dobrowolski, mineja inĝeniero, strato Henryka Poboinego 40/2.

Sarlando

St. Imbert D.: Vakas.

Svedujo

Alingsås VD.: s-ro Roland Lindblom, muntisto, Seagatan 39.

Borås FD (Fotografio): s-ro Alvar Johansson, fotografisto, Vintergatan 18.

Malmö (Skåne) FD (Navigado): s-ro F. T. Lundqvist, ekŝipestro, Amiralsgatan 66a.

Skellefteå (Västerbotten) D.: Vakas

FD (Telegrafio): Vakas.

Trelleborg (Skåne) D.: s-ro Einar Andersson, submastro, Hedvägen 146.

VD.: s-ro Georg Östling, oficisto, Hansagatan 3.

FD (Librobindado): s-ro Algot Olsson, librobindisto, Västergatan 40.

Svislando

Fislibach (Aargau) D.: Vakas.

FD (Kursgvidado): Vakas.

Usono

Charles River (Massachusetts) D.: Vakas.

FD (Scienco): Vakas.

Jersey City (New Jersey) FD (Vegetarismo): s-ro Rejo Pease, elektra inĝeniero, P.O. Box 604, Journal Sq. Sta.

Riverdale (Maryland) D.: s-ro John M. Robinson, fervojisto, 6016 Sarvis Avenue.

FD (Fervojoj): La D.

Washington (District of Columbia) FD

(Inventaĵoj kaj Patentoj): s-ro William Edward Baff, advokato kaj Patent-Disponisto, 610 C Street S.E.

DONACOJ

AL LA ĜENERALA KASO

E. Mila 5,40 gld.; D-ro W. Treude 1,81 gld.; C. N. Ayres 1,90 gld.; G. P. Turner 3,99 gld.; S. A. Sinnick 5,70 gld.; B. Reich 19 gld.; A. Omlor 10,80 gld.

Kroatia Esperanto Ligo eldonis libreton:

TEATRO EN SOCIETO

Aŭtoroj: E. Lapenna, M. Mamuzić, S. Mulo.
Mallongaj originalaj teatraĵoj ludeblaj en societejoj, distre-karakteraj.

Scenejo, kulisoj, teatraj kostumoj nebezonaĵ.
Konvena helpilo en laboro kun gejunuloj.
Programeroj por Zamenhofaj-vesperoj.
Legajo por konversaciaj kursoj.

Prezo: en Jugoslavio 120 Din, en eksterlando 2 ned. guldenoj.

MENDU ĈE UEA

Statistiko pri nia Membraro en 1956

	A.M.	M.J.	M.A.	M.S.	Pat.	D.M.	H.M.	Sumo
Acoroj	—	—	2	—	—	—	—	2
Adeno	—	—	1	—	—	—	—	1
Algerio	—	—	2	1	—	1	—	4
Angolo	—	—	6	2	—	—	—	8
Antiloj ned.	—	—	1	—	—	—	—	1
Argentino	—	—	45	3	—	3	—	51
Aŭstralio	90	3	82	8	—	12	—	195
Aŭstrujo	—	31	75	8	—	1	3	118
Belgujo	471	17	114	17	—	4	1	624
Borneo	—	—	—	—	—	1	—	1
Brazilo	2235	63	228	137	3	26	1	2693
Britujo	691	112	467	96	2	70	5	1443
Bulgarujo	1120	—	11	—	—	1	1	1133
Cejlono	—	—	—	—	—	2	—	2
Cipro	—	—	1	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo	—	41	144	—	—	3	6	194
Cilio	—	—	3	—	—	—	—	3
Cinujo	—	—	3	—	—	1	—	4
Danlando	844	32	142	22	—	1	1	1042
Egiptujo	—	—	1	—	—	2	—	3
Estonio	—	—	1	—	—	—	—	1
Etiopio	—	—	1	—	—	—	—	1
Finnlando	2	61	238	—	—	1	1	303
Franca Ekv. Afriko	—	—	2	—	—	—	—	2
Franco	1546	74	396	52	—	17	8	2093
Germanujo	2385	47	297	66	—	12	2	2809
Grekujo	—	1	10	—	—	—	1	12
Gvatemalo	—	—	4	—	—	—	—	4
Hindujo	—	—	2	—	—	—	—	2
Hispanujo	353	12	164	15	—	6	—	550
Hungarujo	—	—	10	1	—	—	3	14
Indonezio	—	—	3	—	—	—	—	3
Irano	—	—	2	—	—	2	—	4
Irlando	—	3	4	—	—	1	—	8
Islando	—	2	34	1	—	3	—	40
Italujo	1150	32	201	20	—	3	1	1407
Italo	—	—	29	—	—	2	—	31
Izraelo	—	—	98	—	—	—	1	265
Japanujo	150	16	98	—	—	—	—	265
Jugoslavio	1533	32	157	20	—	3	—	1745

DONACIOJ FONDAĴO-EKSPOZICIO

A. Linás 3,36 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon

NOVA KOMITATANO

Murgin, Canko, Kv. Malĉika 41, Sofia 29, Bulgarujo.

INFORMO POR IZRAELO

Nia peranto en Izraelo informas, ke pro ŝanĝo de la kurzo la egalvaloro de MA-kotizo por 1957 estas en izraela valuto: 7 izr. funtoj. La izraelaj samideanoj, kiuj jam pagis laŭ la malnova tarifoj bonvolu afable alpagi la diferencon.

MAG RETO ROSSETTI NOMITA SEKRETARIO DE ISU

Per skriba voĉdono la Estraro de UEA unuanime elektis s-ron Mag. Reto Rossetti, College of Art & Crafts, 26, Priory Road, Birmingham 5, Anglujo, Sekretario de Internacia Somera Univerŝitato por la sekvanta 3-jara periodo.

Al s-ro Lektoro J. H. Rosbach, kiu en la lastaj 2 jaroj funkciis kiel Sekretario, sed kiu pro troa profesia okupiteco ne povis daŭrigi la laboron, la Estraro esprimas koran dankon pro la bone plenumita tasko. Al la nova Sekretario ĝi deziras sukcesan laboron.

MALSANO

DE S-RO M. P. MABESOONE

Pro sia malbona sanstato, s-ro M. P. Mabesoone devis, laŭ la konsilo de sia kuracisto, rezigni pri sia funkcio en la Estraro.

Esperante, ke li baldaŭ plene resaniĝos kaj reakiroj siajn fortojn, tiel ke li povos denove doni al la Asocio kaj al la Movado sian valoran helpon, la Estraro decidis proponi al la Komitato ne elekti alian estraranon anstataŭ s-ro Mabesoone.

Dankon al s-ro Mabesoone pro la granda laboro, kiun li donis por la Asocio, kaj korajn bondezirojn.

M. H. VERMAAS,
Dir. C.O.

ANONCETOJ

Instruisto en Rotterdam, vegetarano, ĉeestonta Marsejlan Kongreson, serĉas gastiganton dum du semajnoj, ĉu kiel paganta gasto aŭ kontraŭ estonta reciproka gastigado en Rotterdam. Blokpoel, Groeninstraata 20a, Rotterdam, Nederlando.

Interstena gvidilo por angla lingvo kostas 3 resp. kup. registrite: C. Daglio, Litta Parodi, Alessandria, Italujo.

Kanado	—	5	25	9	—	3	—	42
Kenjo	—	—	1	1	—	1	—	3
Kolombio	—	—	1	—	—	—	—	1
Kongo Belga	—	—	1	2	—	—	—	3
Koreo	—	—	2	—	—	—	—	2
Kubo	—	—	6	—	—	—	—	6
Latvujo	—	—	2	—	—	—	—	2
Libano	—	—	1	—	—	—	—	1
Libio	—	1	8	—	—	—	—	9
Lihtenŝtejno	—	—	1	—	—	—	—	1
Madagaskaro	—	—	3	—	—	—	—	3
Malajo	—	—	1	—	—	—	—	1
Malto	—	1	—	—	—	—	—	1
Maroko	111	33	41	25	—	5	1	216
Meksikio	—	1	12	—	—	1	—	14
Monako	—	—	1	—	—	—	—	1
Nederlando	674	76	322	38	—	11	5	1126
Nigerio	—	—	1	—	—	—	—	1
Norvegujo	663	17	97	30	—	7	1	815
Novgvineo	—	—	1	—	—	—	—	1
Nov-Zelando	197	11	52	10	—	8	—	278
Ora Bordo	—	—	1	—	—	—	—	1
Pollando	2100	1	156	1	—	—	1	2259
Portugalujo	—	2	41	10	—	4	2	59
Rodezio	—	—	7	1	—	—	—	8
Rumanujo	—	—	1	—	—	—	1	2
Sarlando	—	1	13	3	—	1	—	18
Siera-Leono	—	—	—	—	—	1	—	1
Sirio	—	—	1	—	—	—	—	1
Sovetunio	—	—	19	—	—	—	—	19
Sudafriko	—	3	17	3	—	3	—	26
Svedujo	1350	141	361	75	1	22	2	1952
Svislando	220	66	115	14	2	29	3	449
Tajlando	—	—	1	—	—	—	—	1
Trinidado	—	—	1	—	—	—	—	1
Tunizio	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo	—	1	14	—	—	—	—	15
Urugvajo	—	—	19	9	—	1	1	30
Usono	221	23	104	45	1	16	1	411
Venezuelo	—	—	8	1	—	—	—	9
Vietnamo	—	—	—	1	—	—	—	1
80 landoj:	18106	962	4440	747	9	291	53	24608

Okaze la letervesperon aranĝotan je la 24 majo 1957 — tago de la popola klerigado je fino de la kurso kiun studas 93 gekursanoj, diversaj profesioj — leterojn, poŝtkartojn, ilustritajn esper. kaj nacilingvaj gazetojn sendu al: Esperantista Societo „Balkana Stelo“, urbo TROJAN, Bulgario.

Deziras korespondi kun tutmondo. Interesiĝas pri poŝtkartoj. Certe respondos Turĉinek Stěpan, Fuč 297, Vitkov, Slezsko, Ĉeĥoslovakujo.

Deziras korespondi kun siaj malnovaj kaj novaj geamikoj en la tuta mondo: s-ino Anna Bárochová-Nyvlitová, Sokolská 17, Praha 2, Ĉeĥoslovakujo.

En tuta gefrateco kaj komuneco vivas pli ol mil homoj en la bruderhof-komunumoj. Regularn novajleteron petu ĉe Societo de Gefratoj, Bromdon, Bridg-north, Britujo.

Fakajn revuojn pri minejaj aferoj (precipe pri metalaj krudaĵoj) en angla aŭ germanaj lingvoj deziras ricevi juna mineja inĝeniero Leszek Dobrowolski, poŝto Złotoryja, str. Henryka Pobożnego 40/2, ĉoj. wrocławskie, Pollando. Rekomencos per polaj ilustritaj albumoj, libroj, revuoj ktp. laŭdezire.

Korespondi kun ĉiuj landoj deziras H. Khel, FD de UEA, Pivonková, Praha 10, Ĉeĥoslovakujo.

Haus der Jungen Pioniere, Pirna, An der Gottle ba 1, DDR, Germanujo deziras korespondi kaj interŝanĝi kun pacamikoj kaj ĉiaj progresemaj individuoj kaj organizoj. Peradas P. Glöckner, deleg. de UEA. E-kurso projektita.

Kvar liceaninoj 14—16 jaraj deziras korespondi kun junulinoj el nordaj landoj, Sud-Ameriko, Japanujo, Grekujo. Skribi al: Prof. Laurenti, Lycée filles, Montpellier (Herault), Francujo.

Deziras korespondi kun britaj gesamideanoj s-ro José de Freitas, Martins, Banco Nacional Ultramarino, Espinho, Portugalujo.

Por nia Letervespero de Majo, sendu multajn leterojn kaj bildkartojn. Respondo garantiata - „Esperanto-Klubo“, Collège, Royan (Ch.-M.), Francujo.

Ludonanto de somerdometoj serĉas luprenantojn en majo, junio kaj septembro. Ĉiuj loĝejoj estas aranĝitaj komplete, escepte tolaĵo. Ilustritan prospekton mi sendas je peto. Pasigu vian ferion sur la belega insulo Terschelling. Adreso: R. J. Kruijer, Midsland, Nederlando.

Deziras korespondi 100 hungaraj komecantoj ambaŭseksaj 12—5-jaraĝaj, lernantoj, laboristoj kaj oficistoj kun ĉiuj landoj. Skribu tuj al la adreso: Ludoviko Király, Del. de UEA, Szigligeti Ede-ter 2, Miskolc, Hungarujo.

Juristo 26-jara, Skoczek Jerzy, ul. Swarozycza 6/7, Szczecin, Polando, fraŭlo, deziras korespondi kun juna polinezidino de insuloj havajaj pri temoj: juraj, historiaj, popoloj kaj moroj de polinezia loĝantaro, kaj ankaŭ kun juristo en tutmondo pri juraj temoj.

Letervesperon la 28-an de marto omaĝe de memoro de ĉeĥa ekzilito J. A. Komensky aranĝos Esperantista Klubo en Jihlava, Ĉeĥoslovakio. Vian leteron atendas pli ol cent esperantistoj.

Por **Vendi**. Domo el ŝtonoj kun tri apartamentoj po du ĉambroj, kuirujo, elektro, akvo ktp. sur Placo de la vilaĝo ASPRE-MONT (Alpes Maritimes) Francujo, 14 kilometrojn norde de la marbordo de Nice. Altitudo 530 metrojn kun tereno 30.000 kvad. metroj je 1½ kilometroj de la domo. Neta enspezo jare 210.000 francaj frankoj. Prezo 3.500.000 francaj frankoj kontante. Por detaloj skribu al E. Yelland, ASPRE-MONT A.M., Francujo.

Regina de Godoy, Rua Almirante Alexandrino 976, bloco F., ap. 301, Rio de Janeiro, Brazilo, 16-jara knabino, deziras interŝanĝi poŝtkartojn.

15-a Brazila Kongreso de Esperanto. Adreso: Caixa Postal 10, Niteroi, Estado do Rio, Brazilo. 14/21 Julio 1957. Oni organizos ekspoziciojn en ĉefa urboparto. Sendu salutkarton kaj vi ricevos kongresajn publikigaĵojn.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multajn adresojn haveblajn el Britujo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Pollan-

do, Japanujo, Bulgarujo, Finnlando. Skribu, indikante viajn sekson, aĝon, profesion, al: Daniel LUEZ, LAON (Aisne) Francujo kaj enmetu unu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

JUNULARA CENTRO „STELLA”, serĉas en la tuta mondo gejunulojn, kiuj dezirus krei similajn centrojn en sia lando. Celoj: helpo al netaŭge loĝatoj, al junaj geedzoj, al naskintaj fraŭlinoj, al rifuĝintoj, eltrovo de laboro por la junuloj, malfermo de junulrestoracioj je modestaj prezoj, diskonigo de Esperanto, ktp. Por ĉia informo, skribi al: S-ro Lagrange Henry, 81 rue de la République, DIEPPE, Sne Mme.

Ĉu vi pagis vian kotizon 1957??

Se ne, faru senprokraste!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de **Prof. G. Waringhien** kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abononjn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU.SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7, Av. Léon-Gourault Choisy-le Roi (Seine)
Administracio: 5. Bd. Stalingrad Nice (A-M) Francujo.

SENSACIA!

KULTURAJ INTERNACIAJ FERIOJ

Kun: Profesoroj LAPENNA - WARINGHIEN
D-ro ALBAULT - Ing. WATIER
Mag. AULD

LA EVOLUO DE L' CIVILIZOJ KAJ
LA MODERNA SOCIO

Prelegoj - Kulturaj ekskursoj - Debatoj
ĉe

KASTELO GRESILLON

14-an - 24-an Julio 1957

Petu informilon kaj kompletan programon de la Prezidanto de la Kulturdomo.

Kastelo Grésillon - Baugé - M & L - Francujo

FRUA ALIĜO ESTAS KONSILINDA!

5-a Internacia Esperanto Ferio-Semajno

Krommenie - Nederlando

11-19 AŭGUSTO 1957.

La loka Esperanto Grupo „LINUECO” kore invitas Esperantistajn unuopulojn kaj grupojn partopreni en la 5a I.E.F.S., kiu samtempe estas Jubilea Semajno kaj ĉi-jare okazos de la 11a ĝis la 19a de Aŭgusto.

Sen troigo ni povas diri ke niaj Semajnoj ĝuas bonan reputacion. Pasintan jaron ni akceptis gesamideanojn el 6 diversaj landoj kaj la unuaj aliĝoj por ĉi tiu Jubilea Semajno jam envenis, nome el Italujo kaj Jugoslavio.

Ni prezentas: Interkonatiĝvesperon; allogajn ekskursojn, aŭtobuse kaj boate, al la plej gravaj vidindaĵoj de Nederlando, i.a. al Volendam, al Marken, al la granda digo, al la fromaĝfoiro de Alkmaar, al Amsterdam kaj al 's-Gravenhage; kaj grandan adiaŭan festvesperon.

Ĉiuj partoprenantoj gastos senpage ĉe lokaj gesamideanoj, tial la partoprenkostoj estas nur 60 ned. gld. (240 steloj) por la tuta semajno, inkluzive ĉiujn ekskursojn.

Limdato de aliĝo la unuan de majo 1957.

Pliajn detalajn informojn volonte donos nia sekr.ino: J. A. v. d. Meulen-v. Harten, Popelstraat 13, Krommenie.

GIS REVIDO EN NIA JUBILEA 5a I.E.F.S. en KROMMENIE.

(reprezo petata).

ALIĜU TUJ AL MARSEILLE

LA UNIVERSALA KONGRESO ĈE LA BLUA MEDITERANEO
POST LA FINO DE MARTO LA KOTIZOJ DENOVE PLIALTIĜOS!

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam